

ESPERANTO

INTERNACIA REVUO ESPERANTISTA

N-ro 506

DECEMBRO 1947

NOVAJ ALLOGAJ LIBROJ POR LA ESPERANTISTARO

Ĉe la Sanktaj Akvoj. J. C. Heer.

El la germana lingvo tradukis A. Bader, P. Le Brun, J. Schmid.
82 paĝoj, broŝ. 4 ŝil., afranko 3p. (17 rpk.)

Du Amosentaj Noveloj. T. Storm, M. Escherich.

El la germana lingvo tradukis A. Bader.
42 paĝoj, broŝ. 2ŝ. 6p., afranko 2p. (11 rpk.)

Esperanta Krestomatio.

Kompilita de H. A. de Hoog, Mr. A. J. Kalma, W. F. Kruit,
Frato W. van Zon.
120 paĝoj, kartonita 4ŝ. 6p., afranko 3p. (19 rpk.)

Esperanto 60-jara. G. J. Degenkamp.

Skizo pri la evoluo de la lingvo literatura.
58 paĝoj, kartonita 3ŝ. 6p., afranko 3p. (15 rpk.)

La Nevenkebla Ĝeno. Theo Thijssen.

El la nederlanda lingvo tradukis F. Faulhaber.
319 paĝoj, bindita 9ŝ. 6p., afranko 6p. (40 rpk.)

Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

Ni bedaŭras ke ni ne povas akcepti mendojn el landoj de kie oni ne povas
sendi pagon (aŭ rpk.) al ni.

ANONCETOJ

Kosto : du pecoj por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkuponon por ĉiu du da vortoj.

La Kvakerismo (Religia Societo de Amikoj)—Por senpagaj ekzempleroj de literaturo (en Esperanto kaj kelkaj Eŭropaj lingvoj) skribu al Friends Service Council, Friends House, Euston Road, London, N.W.1, Anglujo.

Ne-Katolikoj, kiuj deziras informojn pri la katolika religio povas ricevi ilin senpage de la Internacia Katolika Informejo, Fraterhuis, Loonopzand, Nederlando.

Kio estas Pensologio? Broŝureto sendota senpage, kun folio LA VIVO TRANSFORMITA, laŭpete al (E) Hipsley, 17 Abbots Road, Birmingham 14, Anglando. POVO SUKCESI kontraŭ 3 i.r.k. "Traktaĵo rekomendinda kaj pripensinda, kun instruoj tre bezonata en la nuna tempo!" (British Esperantist). Hipsley, kiel supre.

Argentino, Buenos Aires (8), Amalia 347 (Liniers). S-ro Giordano Bruno López, p.m. k.ĉ.l., kvanto kaj valoro riceprokaj. Certe respondos.

Ano de Laborista Partio deziras korespondi kun unu serioza Esperantisto en ĉiu lando pri la regado en la lando kaj kiom ĝi rilatas al la demokrata socialismo. S-ino Hilda de Vere, Bela Monto, Wrotham, Kent, Anglujo.

Bildkartoj ilustritaj ĉiulandaj po centoj estas aĉetataj por komercado. Por ofertoj kaj negoc-kondiĉoj skribu esperante, hispane, angle, portugale, itale, aŭ germane al Deleigto de UEA, S-ro Rodolfo García, Yaguarón 1397, Montevideo, Urugvajo.

Don Kihoto de la Manĉo, literatura ĉefverko hispana, en ĉiuspecaj eldonoj fremdlingvaj, ankaŭ en ĝisnunaj esperantaj fragmentoj, aĉete dezirata. Ankaŭ esperanta hispana literaturo ĝenerale kaj speciale. Ĉe hispanoj oni pereblas la UEA-membro-kotizon. Ofertoj kaj havig-kondiĉoj al UEA-Peranto, D-ro R. Zeballos Morales, Fray Marcos (Florida), Urugvajo.

Nederlanda masonisto deziras korespondi kun ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj. Respondo garantiata. Petro Breddels, Rijswijksechestraat 173, Den Haag, Nederlando.

Kristana Frataro : skribu por senpagaj ekzempleroj al "Kristana Frataro", 21 Mitchell Road, Palmers Green, London, N.13, Anglujo. Redaktoro : Livingstone Jenkins.

Polino, 40-jaraĝa vidvino, deziras korespondi tutmonde. Adela Urycz, Kraków, Nowowiejska 15, Pollando.

Leteresperon organizos la Esp. Klubo dum Februaro. Garantiata respondo. Skribu multnombre al la profesoro Mongeois, 11 rue St. Vincent, Ay (Marne), Francujo.

Korespondantojn por dek kvin gekursanoj serĉas Frant. Schwarz, Sezimovo Ústí, Ĉeĥoslovakujo.

Leteresperon aranĝos fine de Decembro, okaze de finigo de E-kurso, Esperanto-klubo Česká Lipa, Ĉeĥoslovakujo. Diversaĝaj ĝelernantoj serĉas tutmonde gekorespondantojn. Skribu tuj salutleterojn kaj poŝtkartojn.

Mi interŝanĝas nur neuzitajn poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj ; ĉiam respondos : S-ro Champonnois, 10 Rue de l'Abbé Grégoire, Issy-les-Moulineaux, Francujo.

Atentu filatelistoj : sendu al Konstanty Wójcik, Polujo, Pabianice, Zamkowa 32, 100-150 pm. de via lando kaj vi ricevos egalkvanton de antaŭmilitaj pm. de Polujo. Mi korespondas ankaŭ germane.

Turistaj broŝuroj pri Belgujo riceveblaj (1 rpk.) : Robert Loeckx, Konijnenperken 107, Boschvoorde, Brussel, Belgujo. Afranku filatele.

Vidaĵkartojn interŝanĝos tutmonde Havlaskino, Upice, Ĉeĥoslovakujo.

Leterespero. "La Twenta Stelo" deziras aranĝi letesperon meze de Januaro. Bonvolu sendi leterojn kaj poŝtkartojn al S-ro M. J. de Lange, Deldenerstraat 282, Hengelo, Nederlando. Al ĉiuj ni sendos respondon.

Juna Esperantistino deziras korespondadon kun la tuta mondo. Mi interŝanĝas librojn, fotojn, ilustritajn poŝtkartojn (speciale de Usono). Certe respondos. Skribu al Else Mattern, Liesborn Krs. Beckum, Dorfstr. 29, Germanujo.

Finnlando. 37-jara bankoficistino deziras interŝanĝi poŝtkartojn kaj leterojn. Fraŭlino Helvi Mattila, Maatalouspankki, Toijala.

Mi serĉas gekorespondantojn por miaj 12-14-jaraj ĝelernantoj-komencantoj. Skribu al P. Woudt, de Kleis 25, Uitgeest, Nederlando.

Korespondi deziras kun ĉiuj mondpartoj Károly kaj Irén Bocó, poŝtmark-, mon-, kaj bildkolektantoj, Hajnal u. 4, Békés I, Hungarujo.

Poŝtmarkojn deziras interŝanĝi tutmonde Rodrigo Figueiredo, rua Ouvidor 108, Rio de Janeiro, Brazilo.

Kun angla kaj franca Esperantistino deziras korespondi Robert Hudic, Jankov u Votic, Ĉeĥoslovakujo.

25 geknaboj el burĝa lernejo (12-15-jaraj) deziras korespondi kun geknaboj ĉl. Skribu al Ant. Rauwolf, falsa instruisto, Mladá Boleslav II/672, Ĉeĥoslovakujo.

Estono, 31-jara studento de teknika fakultato, deziras korespondi kun gesamideanoj en ĉiuj landoj. Specialaj intereso : maŝinfakaj kaj elektroteknikaj aferoj, turismo, literaturo, popolmoroj. S-ro Tiit Kroll, DP Camp, (14b) Reute, über Aulendorf, Germanujo.

Belaj

E-tablo-standardoj

Verda stelo sur blanka fundo kun oraj franĝoj
12 ŝil.

E-insignoj

Verda stelo kun enskribita ESPERANTO
1 ŝil. 6 p.

Mendu ĉe

Esperanto-varbiloj

Waldemar Reinhold

(22a) Duisburg, Germanio, Johanniterstr. 84

Vian pagon direktu al U.E.A.

Abonu al

Internacia Kulturo

La progresema, demokrata revuo, eldonata de la Balkanlandoj. Grandformata ilustrita revuo, enhavanta bonstilajn, interesajn artikolojn. Abonkotizo por la 3a jaro, 1948, 12 numeroj 10 ŝilingoj.

Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo.

ESPERANTO

INTERNACIA REVUO ESPERANTISTA

40a JARO N-RO 506 (12)
Decembro 1947

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio

Fondinto :

H. HODLER

Redaktoro :

HANS JAKOB

Helpredaktoro :

MASON STUTTARD

Cion por la redakcio sendu al
ESPERANTO
Palais Wilson, Genève, Svis.

Cion pri administrado de UEA
kaj de la revuo ESPERANTO,
abonado, reklamoj, anoncetoj
sendu al

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth
Herts., Anglujo

Jara abono : 8 ŝil. anglaj
(kun membreco kaj jarlibro
12ŝ. 6p.)

Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en
multaj landoj

Tarifo por reklamoj :

1 paĝo - 45 anglaj
½ paĝo - 50 ŝil. anglaj
¼ paĝo - 25 ŝil. anglaj
⅓ paĝo - 12.5 ŝil. anglaj

Anoncetoj pri korespondado :

2 pencoj por unu vorto aŭ
1 int. respondkupon por ĉiu
duo da vortoj

Legantoj en 65 landoj

DATREVENOJ

La jarfino estas la momento en kiu pripensi kaj memori. Ankaŭ memoriĝi ! Por ni, Esperantistoj, Decembro estas *nia* monato kaj la 15-a *nia* memortago, la naskiĝtago de Lazaro Ludoviko Zamenhof. Ĉie en la mondo oni festas ĉi tiun datrevenon inter la Esperantistoj kaj eĉ dum la plej malhelaj momentoj de la pasinta militado, dum okupado kaj subpremo—ja eĉ en la koncentrejoj—samideanoj kunvenis kaj kuraĝe konfesis sian fidelon al la ideoj kaj idealo de vera ano de la homaro, kia estis la Majstro.

En 1887 aperis la *Unua Libro* de Esperanto, la ekkomenco de nia klopodo ; dudek jarojn poste H. Hodler transprenis ĉi tiun gazeton, tiutempe aliformatan kaj aperantan dufoje en la monato. En ĝi li evoluis la ideojn, kiuj kondukis al la posta U.E.A.

La jaro 1947 estas tiu de la definitiva firmiĝo de la senpolitika (legu *neŭtrala*) Esperanto-movado. Jam pasis 25 jaroj de kiam en Helsinki oni finfaris Kontrakton inter la tiamaj Naciaj Societoj Esperantistoj kaj U.E.A., unua paŝo al pli intima kaj pli firma kuniĝo. Ankaŭ en tiu jaro, 1922, la plej alta instanco interŝtata, la Ligo de Nacioj, publikigis la faman raporton pri *Esperanto kiel internacia helplingvo*, unu el la plej multe presitaj dokumentoj de la Ligo de Nacioj. Kiom da esperoj ligiĝis al ĉi tiu grava okazaĵo, tio jam estas forgesita hodiaŭ, forblovita de la kruela seniluziigo pri la sinteno de iuj registaroj.

Okaze de la 40-jara jubileo de nia lingvo, la Sovet-Unio eldonis poŝtmarkon kun bildo de D-ro Zamenhof (1927). Kun melankolia sento ni memorigas ĉi tiun fakton kiu montris la grandan intereson de la decidantaj povoj en la Sovet-Unio pri nia afero.

Kion diras al ni ĉi tiuj datrevenoj ? Ili montras, ke Esperanto havas historion, kun supreniroj kaj malsupreniroj, kiel la vivo. Du gigantaj militoj, kiuj detruis multegon, kiuj subminis la bazon de nia miljara civilizacio, ne povis forigi de la scenejo nian lingvon. Ĝi pravas tion, ke bona ideo ne estas forigebla, ke ĝi ĉiam trovas novajn apostolojn kiuj anstataŭas forpasintajn. Evidentiĝas ankaŭ, ke la ideo ideal-praktika bezonas sian tempon por fariĝi ĝeneralajo. Kaj D-ro Zamenhof profete diris :

*Ni paŝon post paŝo, post longa laboro
atingos la celon en gloro.*

H.J.

La Nokto

Super tomb' de l' Majstro ŝvebas nokt' profunda,
Rampas en ombraro parodioj vantaj,
Regas Nokto nigra, je Mensog' abunda . . .
Nokto purajn, verdajn korojn timiganta,
Sed, sondante nokton per la blindokuloj,
Tago, tago ! . . . krias la . . . parodiuloj !

Tago, tago ! . . . sonas kria vort-allogo,
Venko ! . . . vokas ies voĉo ironia,
Sed en vokoĵ tiuj, tiom da mensogo
Kaj sensenc' sin kaŝas, kara Majstro mia,
Ke mi ne plu povas . . . kaj en nokt-nebuloj
Vokas plena-voĉe : Ĉesu, perfiduloj ! . . .

Kiel vi kuraĝas krei : Venko . . . tago ! . . .
Inter rampaj ombroj de la nokt' funebra,
Se ĉi tiu tago estas nur . . . imago
Kaj nerealaĵo de la cerbaj febroj,
Se vi Idealon ŝanĝis je vulgare
kaj aferon faris . . . politik-tendaro ?

Kie lumas tiu suno verdradia
Kaj de ĝi kreata verda tag' eterna,
Se ni . . . *verdsteluloj*, kia ironio,
Ĉesis jam paroli pri l' Ide' Interna,
Kaj benatajn vortojn : Amo, Homo, Frato . . .
Nun anstataŭigas per esprim' : malŝato ?

Se en Esperanta gazetaro ĉie
Oni nun disputas nur pri l' politiko,
Kaj samideanon la germanan, fie
Oni nun alnomas, *nia malamiko*,
Se aferon nian enŝteligis skismoj,
Plej diversaj *ismoj* kaj . . . idiotismoj ?

Homoj, kiuj nomas sin samideanoj
Kaj ripetas ĉie : Ĉiuj homoj—fratoj !
Pravas, ke krimuloj estas nur . . . germanoj,
kaj bonuloj estas nur la . . . demokratoj ;
Unuvorte, oni agas plu hitlere,
Saman hitlerismon . . . alimaniere !

Oni redistingas scion de nescio,
Bonon de malbono laŭ la prakutimo—
Laŭ politikemo, naciec', partio . . .
Ne laŭ homkvalitoj—koro, kaj animo.
Do ni agas plue al kutim' konforme,
Saman hitlerismon . . . nur alia-forme !

Oni jam forgesis, ke krimul' germana,
Ĉu krimul' bigota, pure-ateista . . .
Burga aŭ proleta . . . portugala, dana . . .
Tute demokrata aŭ duonfaŝista,
Ĉu loĝanta apud Rejno, ĉu Vistulo . . .
LA KRIMULO ESTAS ĈIAM NUR KRIMULO !

Sankta vort' *Homamo* iĝis nun banala,
Infanec-naŭa . . . verda utopio,
La Ide' Interna—aĵo nereala,
Unuvorte ĉio iĝis jam nenio.
Nune nur valoras *superec' de l' rasoj*,
Diskutad' pri l' *ismoj* kaj *batal' de klasoj* !
.

Super tomb' de l' Majstro regas nokt' krepuska,
Tago ! . . . vokas ies voĉoj senkonsciaj ;
Inter rampaj ombroj Parodi' embuskas
Kaj silente flustras palaj lipoj miaj :
Ho, Vi bone faris, kara Majstro mia,
Ke vi jam foriris for . . . al mond' alia !

E. Matwiejczuk, Polujo.

Opinio-kontrolo en Hungarujo

Jam en la pasinta jaro ni donis detalojn pri la rezultoj de kontrolo de publika opinio rilate la internacilingvan demandon, kaj precipe pri Esperanto. En *Hungarian Bulletin* (Hungara Bulteno) cirkulero dissendita al redaktoroj kaj gravaj instancoj en Anglujo, ni trovas raporton pri simila enketo en Hungarujo. La raporto tekstas : "La Hungara ĉiusemajna gazeto *Uj Magyarorszag* raportas eksperimenton faritan de la Hungara Publik-opinio-kontrolo. Tiu demandis la publikon, kion ĝi opinias pri Esperanto.

El la respondoj evidentigis, ke 86% de la Budapeŝta publiko aprobas internacian lingvon per kiu ĉiu povus sin komprenigi en ĉiu lando de la mondo. 45.6% esprimis volantecon eklerni la lingvon se oni starigus trimonatajn kursojn tiucele.

Unu el la demandoj estis : Kiel vi volus uzi la lingvon, kiam vi lernis ĝin ? 56% diris, ke ili volus korespondi kun Esperantistoj en aliaj landoj. Multaj volus tiel korespondi por lerni kaj ekscii pri la vivo en aliaj mondpartoj. Aliaj volus serĉi kulturajn kontaktojn kaj profesiajn kontaktojn. Multaj volus uzi sian scion por interŝanĝi poŝtmarkojn. 75% de la publiko opinias, ke estus praktika afero instrui Esperanton en ĉiuj lernejoj.

Alia interesa demando : Ĉu la fakto, ke multaj homoj tra la mondo povas paroli Esperanton, povus helpi al kreo de mondpaco ? 60% kredas, ke jes ; 34% kredas, ke tio ne ŝanĝus la situacion ; 8.3% donis nedefinitivan respondon, kaj nur 1.5% kredis, ke Esperanto estus malutila.

La redaktoroj de Hungara Bulteno tre volas scii, ĉu aliaj gazetoj aŭ Kontroloj de Publika Opinio faris ĉi tiun eksperimenton. Se jes, bonvolu sciigi la Bultenon ĉe Zoltan-utca 6, BUDAPEST, Hungarujo.

Presistoj Atentu !

Oni klopodas konvinki la redaktoron kaj posedantojn de grava internacia revuo de la presfako, fari resumojn en Esperanto pri la ĉefaj artikoloj. Oni tial petas la apogon de fakanoj ; skribu instigan leteron al la revuo ĉe la jena adreso : *International Printing*, Jarrold & Sons Ltd., The Empire Press, NORWICH, Anglujo.

Memore de D-ro L. L. Zamenhof

15 Decembro 1859

Zamenhof !—konato en la hejmo de doloro,
Vi, el raso jam delonge disnacia,
Sentis ĉies malfeliĉon en la propra koro
Kaj sopiris al homaro familia.
En la mondo, kiun vortoj, vortoj jam inundis
Per malamo, miskompreno kaj arbitroj,
Vi batalis ĝis la malamikoj vin elvundis,
Vi, kolombo, inter rabaj akcipitroj.

Korrompita mortis vi, en mondo al milito
Sin doninta kaj graveda per la semoj
De terura estonteco. Tamen la spirito
Scias, kiel tra la postaj perdoj kaj subpremoj
Via mensa ido plifortiĝis sur la tero—
Kiel, nun elkorpigita, la animo
Strebas al pli vasta regno ; ĉar la granda vero
Fendas la kokonon de l' homeca limo.

Kio estas Vero, krom la universa Lego,
Kiun vidas nur popece ĉiu homo,
Same kiel malsanulo en fenestra seĝo
Vidas la ĉirkaŭon de neniua domo ?
Tamen vi la veron tuŝis en la homa menso,
Truegante murojn, kiuj interstaras :
Ĉar la vero trovas veron en komuna penso
Kiel akvo akvon, kvankam ĉio baras.

Vane tian veron la tirano penas kaŝi :
Ju pli oni premas ĝin, des pli ĝi ardas :
Kiu por detrui veron riskas ĝin alpaŝi,
Cedas nun al tio, kion li rigardas.
Tiel ĉe animo via : ĉiu homangoro,
Ĉiu timo, ĉiu manko aŭ sopiro
Tuj malfermas al vi pordon en la homa koro—
Kaj vi vekas la esperon en martiro.

Jen ! de via genieco la centmil fajreroj
Falis, kaj flagretis sur diversaj lokoj.
Iuj sufokiĝis en malpuraj atmosferoj,
Iuj estingiĝis sur la nudaj rokoj.
Tamen laŭ la nevidataj vojoj rampebrulos,
Kuniĝonte, la flametoj de l' espero—
Ĝis la finbriladon eĉ la steloj respegulos,
Por konservi vian lumon sur la tero.

*Originale verkis
Brendon Clark, Nov-Zelando.*

33a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

UNUA INFORMILO

Loka Kongresa Komitato : *Prezidanto*, Jan Strönné ; *1-a Viceprezidanto*, Oscar Runerheim ; *2-a Viceprezidanto*, Helge Andrén ; *Ĝenerala Sekretario*, O. T. Nicolaisen ; *1-a Sekretario*, Ester Andrén ; *2-a Sekretario*, Gösta Henriksson ; *1-a Kasisto*, Alve Persson ; *2-a Kasisto*, Harry Nilsson.

Programa sekcio : Jan Strönné, Wilhelm Johansson, Eric Fredin, Harry Adler.

Pres- kaj propagand-sekcio : Jan Strönné, Rud. Demuth, Frans Rasmussen, Harry Nilsson.

Loĝiga sekcio : Jan Strönné, Olof Glemminger, Reinhold Hansson, Gösta Henriksson, Harry Nilsson.

Financa sekcio : Jan Strönné, Alve Persson, Harry Nilsson.

Aliaj L.K.K.-anoj : Olle Anderberg, Ernst Andersson, Hjalmar Andersson, Hans Christoffersson, Sixten Claussen, John Ek, Clary Hansson, Hilbert Hansson, Gust. Lidbjer, Lennart Magnusson, Erik Olsson, Nils Persson, Sture Persson, Ester Wallin, Hildur Wallin.

Adreso por leteroj : 33-a Universala Kongreso de Esperanto, MALMÖ, Svedujo.

La kongresa oficejo : Kamrergatan 3, MALMÖ.

Malferma solenaĵo : Urba Teatro.

Kongresejo : Gimnazia lernejo por knabinoj.

	ĝis		poste
	31/12/47	31/3/48	
Kongresano .. sved. kr.	20	25	30
Edzo aŭ edzino de kongresano sved. kr.	10	15	20
Junul(in)o ne pli ol 20-jara sved. kr.	8	10	15

(vidu ankaŭ la 4-an paĝon de la kovrilo)

Pagoj : Estas akceptataj

- ĉiuj pagiloj ŝanĝeblaj en bankoj. Atentu : **ne sendu** monbiletojn en letero !
- internaciaj poŝtmandatoj, ĉekoj k.t.p. pageblaj al la Universala Kongreso de Esperanto, Malmö ;
- pagoj al la sveda poŝtĉekkonto 24 60 18 (nur por svedoj) ;
- pagoj al A. B. Svenska Handelsbanken, Malmö, Svedujo, konto de la Universala Kongreso de Esperanto, Malmö.

Oni prefere pagu al iu banko petante, ke la monsumo estu sendota al A. B. Svenska Handelsbanken, Malmö, konto de la Universala Kongreso de Esperanto, Malmö, kaj kun sciigo pri la sendinto.

Kiel pagon por la kongreskotizo ni akceptas nek poŝtmarkojn, nek internaciajn respondkuponojn, kaj nek iajn varojn.

Aliĝiloj : Haveblaj ĉe la Kongresa oficejo kaj ĉe la landaj asocioj. Aliĝilo validas nur kun samtempa pago.

Kongreskarto : Tuj post la ricevo de la aliĝilo kaj kotizo, L.K.K. sendos kongreskarton kaj necesajn sciigojn al la kongresano.

Al informpetoj bonvolu aldoni internacian respondkupono.

Glumarkoj : Mendu kaj uzu kongresajn glumarkojn. Por sved. kr. 0.30 aŭ unu internacia respondkupono oni ricevos 15 glumarkojn.

Kiom valoras unu sveda krono en via landa valuto ? Demandu pri tio en la plej proksima banko aŭ vojaĝoficejo.

Donacoj : helpas sukcesigi la kongreson. La L.K.K. antaŭdankas al donacantoj.

Blinduloj : Konforme al la Kongresregulato de U.E.A., blindulo kaj lia gvidanto ricevos senpagan kongreskarton ĝis la fino de Marto 1948 ; poste ili devos pagi kongreskotizon po sved. kr. 5. La aliĝilo de blindulo devas esti subskribita de blindula organizaĵo, aŭ de okulkuracisto.

Blindula kaso : Helpu ebligi al blinduloj la kongresviziton ; la komitato antaŭdankas akceptas donacojn por tiu kaso.

Fakkunsidoj : Tiuj, kiuj volas aranĝi fakkunsidojn, estas petataj sendi informojn al ni kiel eble plej frue, kun indiko pri la supozebla nombro da ĉeestantoj. Ankaŭ tiuj fakoj kiuj jam estas menciitaj en la provizora programo devos skribi al ni tuj. Se ni ne aŭdos ion de ili ni forprenos la kunsidon en la definitiva programo.

Pasport-vizoj : De kelkaj landoj oni ne plu bezonas vizon por Svedujo. En aliaj landoj ni provos akiri senpagan vizon por la kongresantoj. Sciigon pri tio vi ricevos poste en via landa gazeto Esperantista.

Kongresa numero : Sur via kongreskarto vi trovos vian numeron. Ni petas vin ĉiujfoje skribi vian kongresan numeron sur la leteroj, poŝtkartoj, kaj kiam vi sendos monon. Tio estas grava por ni.

Nomo kaj adreso : Skribu la nomon kaj adreson tre klare kaj legeble. Prefere per literoj similaj al la presitaj. Se vi skribas vian familian nomon antaŭe, metu 2 streketojn sub ĝin.

Karavanoj : Tiuj, kiuj intencas aranĝi karavanon al Malmö, estas petataj skribi al ni tuj.

Vojaĝ-prezredukto : Pro la nuntempaj malfacilaĵoj ni ne povas aranĝi vojaĝ-prezredukton nek en Svedujo nek en aliaj landoj.

Loĝejo : En ĉiuj urboj de la tuta mondo mankas loĝejoj (hotelĉambroj k.t.p.) por vizitantoj, kaj en Malmö ne estas escepto. Pro tio estas necese antaŭmendi loĝejon, kaj ni devas akcepti **antaŭpagon** por povi rezervi lokon por vi.

Ĉi-sube ni indikas diversajn kategoriojn por la hoteloj. L.K.K. faros sian plejblon havigi bonajn hotelĉambrojn por kiel eble plej malaltaj prezoj en la kadro de la indikitaj kategorioj.

La ĉambroj ĉe privatuloj estas bonaj, kaj *ni rekomendas ilin* ; se oni volas havi ĉambron kun du litoj, bonvolu noti tion kaj menciu samtempe kun kiu persono oni volas loĝi.

En la amasreŝtejoj, la Sveda Ruĝa Kruco disponigos bonajn litojn kun litajo kaj litutokoj.

En la hotelprezoj estas enkalkulita la trinkmono, sed ne la transporto de la pakajo.

Kategorio I.

Hotelĉambroj, grupo a ..	11 sv. kr. por unu nokto
grupo b ..	9 " " " " "
grupo c ..	7 " " " " "

Kategorio II.

Ĉambroj ĉe privatuloj ..	4 " " " " "
--------------------------	-------------

Kategorio III.

Amasreŝtejo en lernejo ..	2 " " " " "
---------------------------	-------------

Kategorio IV. Tendaro. Tendoj lueblaj por sv. kr. 1.50 por unu nokto. La tendarejo estas senpaga.

Libertempa interŝanĝo de loĝejo : Ne plu estas Esperantisto en Malmö, kiu povas gastigi kongresanon kontraŭ loĝado en lia hejmo poste. Ĉiu jam akceptis lun.

Manĝado : La nutradon ĉiu kongresano mem prizorgu. Je la dispono estos multaj bonaj restoracioj, inter kiuj la kongresanoj laŭplaĉe povas elekti. L.K.K. donos konsilojn kaj liston en la dokumentaro, pri la restoracioj. Oni do mem kunportu svedan monon por la nutrado.

Jen la prezoj. Al tiuj prezoj oni aldonu 10% trinkomonon. La malkara manĝaĵo estas bona kaj sufiĉa, se oni ne estas tro postulema.

Matenmanĝo ..	sv. kr. 1.50 ĝis 2.00
Tagmanĝo ..	„ „ 2.50 „ 5.00
Vespermanĝo ..	„ „ 2.50 „ 5.00

Porĉiigado : Nur la manĝaĵoj kaj sapo estas porĉiigataj en Svedujo. Aliajn aĵojn oni povas aĉeti libere. Ĉe la enveturo en la landon oni ricevos pan-, buter- kaj viandkuponojn por 4 tagoj. Por la ceteraj tagoj L.K.K. aranĝos poste. La kuponoj validas nur en restoracioj. (Kaf-, te-, kaj sukerkuponojn oni ricevas nur post 12-taga restado en Svedujo, sed en la restoracioj oni ne bezonas tiajn kuponojn.

Unua listo de la kongresanoj

1. S-ro E. Malmgren, Stockholm, Svedujo
2. D-ro P. Kempeneers, Uccle, Belgujo
3. Int.-Gen. L. Bastien, Paris, Francujo
4. S-ro H. Kürsteiner, St. Gallen, Svisujo
5. S-ro C. C. Goldsmith, Rickmansworth, Britujo
6. S-ro J. Strönné, Malmö, Svedujo
7. S-ro O. W. Runerheim, Malmö, Svedujo
8. S-ro H. Andrén, Malmö, Svedujo
9. S-ro O. T. Nicolaisen, Norvegujo
10. S-ino E. Andrén, Malmö, Svedujo
11. S-ro G. Henriksson, Malmö, Svedujo
12. S-ro A. Persson, Malmö, Svedujo
13. S-ro H. Nilsson, Malmö, Svedujo
14. S-ro E. Adamson, Göteborg, Svedujo
15. S-ro P. W. Baas, Amsterdam, Nederlando
16. J. Baghy, Budapest, Hungarujo
17. Kapitano R. Bugge-Paulsen, Oslo, Norvegujo
18. D-ro Prof. G. Canuto, Parma, Italujo
19. S-ro D. Chagnoux, Yzeure s. Allier, Francujo
20. S-ro G. A. Connor, New York, Usono
21. S-ro E. Dahl, Uddevalla, Svedujo
22. D-ro C. Domingues, Rio de Janeiro, Brazilo
23. S-ro St. Fink-Jensen, Grejsdalen pr Vejle, Danujo
24. S-ro A. Grigorev, Sofia, Bulgarujo
25. D-ro St. Guĝev, Sofia, Bulgarujo
26. S-ro J. Guillaume, Paris, Francujo
27. S-ro H. Jakob, Genève, Svisujo
28. S-ro D. Kennedy, Glasgow, Britujo
29. S-ro J. Kozlevčar, Ljubljana, Jugoslavujo
30. S-ro O. Lange, Odense, Danujo
31. D-ro I. Lapenna, Zagreb, Jugoslavujo
32. S-ro R. Levin, Lyon, Francujo
33. S-ro F. Liechti, Rheineck, Svisujo
34. S-ro B. E. Long, Watford, Britujo
35. S-ro A. C. Oliver, Rickmansworth, Britujo
36. S-ro P. Petit, Rosny-sous-Bois, Francujo
37. S-ro L. E. Pfahl, Croydon, Aŭstralio
38. D-ro E. Privat, Neuchâtel, Svisujo
39. S-ro J. Saldanha Carreira, Lisboa, Portugalujo
40. S-ro J. D. Sayers (Usonano), Giessen, Germanujo
41. S-ro T. Sekelj, Buenos Aires, Argentino
42. S-ro V. Setälä, Helsinki, Finnujo
43. S-ro P. J. Soeters, Zutphen, Nederlando
44. S-ro J. Stenström, Ulricehamn, Svedujo
45. S-ro J. Vondroušek, Brno, Ĉeĥoslovakujo
46. S-ro F. Weeke, Den Haag, Nederlando
47. S-ro H. Adler, Malmö, Svedujo
48. S-ro O. Anderberg, Lund, Svedujo
49. S-ro E. Andersson, Malmö, Svedujo
50. S-ro H. Andersson, Hindby, Svedujo
51. S-ro H. Christoffersson, Malmö, Svedujo
52. S-ro S. Claussøn, Malmö, Svedujo

53. S-ro R. Demuth, Malmö, Svedujo
54. S-ro J. Ek, Lund, Svedujo
55. S-ro E. Fredin, Lomma, Svedujo
56. S-ro O. Glemminger, Malmö, Svedujo
57. S-ino C. Hansson, Malmö, Svedujo
58. S-ro H. Hansson, Malmö, Svedujo
59. S-ro R. Hansson, Malmö, Svedujo
60. S-ro W. Johansson, Malmö, Svedujo
61. S-ro G. Lidbjer, Lund, Svedujo
62. S-ro L. Magnusson, Malmö, Svedujo
63. S-ro E. Olsson, Arlöv, Svedujo
64. S-ro N. Persson, Lund, Svedujo
65. S-ro S. Persson, Malmö, Svedujo
66. S-ro F. Rasmusson, Malmö, Svedujo
67. F-ino E. Wallin, Malmö, Svedujo
68. F-ino H. Wallin, Malmö, Svedujo
- 69-83. Rezervitaj
84. S-ro P. Nylén, Huddinge, Svedujo
85. S-ro K. Söderberg, Uppsala, Svedujo
86. S-ino L. Malmgren, Stockholm, Svedujo
87. S-ino C. Goldsmith, Rickmansworth, Britujo
88. S-ino A.-G. Strönné, Svedujo
89. S-ro H. Buchli, Bern, Svisujo
90. S-ro T. Juhlin, Stockholm, Svedujo
91. S-ino E. Juhlin, Stockholm, Svedujo
92. S-ino E. Bugge-Paulsen, Oslo, Norvegujo
93. S-ro O. Brochmann-Sletterød, Haveby, Norvegujo
94. S-ino Aa. Sletterød, Haveby, Norvegujo
95. S-ro C. O. Östling, Trelleborg, Svedujo
96. S-ino A. M. Östling, Trelleborg, Svedujo
97. S-ino A. Romand, St. Rambert, l'Isle-Barbe, Francujo
98. S-ro G. Köhlmann, København, Danujo
99. S-ino B. Köhlmann, København, Danujo
100. S-ro B. Beckman, Lund, Svedujo
101. S-ino L. Glemminger, Malmö, Svedujo
102. S-ino S. A. Norlin, Uppsala, Svedujo
103. S-ino L. Nilsson, Malmö, Svedujo
104. S-ro A. B. Malmkvist, Visby, Svedujo
105. S-ino K. Malmkvist, Visby, Svedujo
106. S-ro P. H. Lewis, Didcot, Britujo
107. S-ro H. Carrfors, Stockholm, Svedujo
108. S-ino S. Carrfors, Stockholm, Svedujo
109. F-ino A. Olsson, Göteborg, Svedujo
110. S-ro N. Olsson, Höör, Svedujo
111. S-ino T. Olsson, Höör, Svedujo
112. S-ro O. Olsson, Vimmerby, Svedujo
113. S-ro H. Albinsson, Vimmerby, Svedujo
114. S-ro C. B. Lundborg, Malmö, Svedujo
115. S-ino A. Lundborg, Malmö, Svedujo
116. S-ro S. Nummelin, Ulvsunda, Svedujo
117. S-ro E. R. T. Bonander, Karlskoga, Svedujo
118. S-ino G. S. Bonander, Karlskoga, Svedujo
119. S-ro C. A. Klang, Akarp, Svedujo
120. S-ino A. Alamo, Stockholm, Svedujo
121. S-ro A. Andersson, Malmö, Svedujo
122. S-ino A. Andersson, Malmö, Svedujo
123. F-ino L. Andrén, Malmö, Svedujo
124. S-ino E. S. E. Andersson, Hindby, Svedujo
125. F-ino E. I. A. Andersson, Hindby, Svedujo
126. S-ino H. Demuth, Malmö, Svedujo
127. S-ro S. E. S. Eriksson, Uppsala, Svedujo
128. F-ino H. Hansson, Malmö, Svedujo
129. F-ino H. E. Henriksson, Malmö, Svedujo
130. S-ino H. Atlas, Malmö, Svedujo
131. F-ino A. Paulsson, Malmö, Svedujo
132. S-ro H. Olsson, Trelleborg, Svedujo
133. F-ino M. Persson, Malmö, Svedujo
134. S-ro S. G. Sjöblom, Malmö, Svedujo
135. S-ro L. Vasiljev, Kopenhago, Danujo
136. S-ino L. Riedle, Zürich, Svisujo
137. S-ro W. Laederach, Zürich, Svisujo
138. F-ino B. M. Chipperfield, London, Britujo
139. S-ro E. G. Marin, Whiteway, Britujo
140. S-ro G. W. Roome, Sheffield, Britujo

141. S-ro J. Kořinek, Brno, Ĉeĥoslovakujo
142. S-ino H. Kořnikova, Brno, Ĉeĥoslovakujo
143. S-ro J. Molnar, Praha-Bubenee, Ĉeĥoslovakujo
144. S-ino M. Mattyasovszky, Budapeŝt, Hungarujo
145. S-ro C. Modesto, Forlì, Italujo
146. F-ino K. Walden, Ystad, Svedujo
147. S-ro J. Vitek, Hradec Králové, Ĉeĥoslovakujo
148. S-ino M. Vitková, Hradec Králové, Ĉeĥoslovakujo
149. S-ro L. S. Lundell, Malmö, Svedujo
150. S-ro R. Hammarlind, Rävlanda, Svedujo
151. S-ro R. Linse, Jönköping, Svedujo
152. S-ro C. Hougaard, Aabyhøj, Danujo
153. S-ino J. Hougaard, Aabyhøj, Danujo
154. S-ro S. K. Nielsen, Fredericia, Danujo
155. S-ino T. Nielsen, Fredericia, Danujo
156. F-ino V. Nielsen, Fredericia, Danujo
157. S-ino A. Christoffersson, Malmö, Svedujo
158. S-ino K. Olsson, Ärlöv, Svedujo
159. F-ino M. Söderberg, Uppsala, Svedujo
160. F-ino B. Söderberg, Uppsala, Svedujo
161. F-ino I. Aronsson, Karlskoga, Svedujo
162. F-ino C. Bruér, Malmö, Svedujo
163. F-ino E. Johansson, Malmö, Svedujo
164. S-ro C. H. Johanson, Linköping, Svedujo
165. S-ino A. E. Johanson, Linköping, Svedujo
166. S-ro A. Palmkvist, Malmö, Svedujo
167. S-ino B. Palmkvist, Malmö, Svedujo
168. S-ro K. A. Rosengren, Malmö, Svedujo
169. S-ro B. Zell, Göteborg, Svedujo
170. S-ro A. de Visser, Dordrecht, Nederlando
171. S-ino G. de Visser, Dordrecht, Nederlando
172. F-ino J. Dedieu, Toulouse, Francujo
173. S-ro H. W. Holmes, London, Britujo
174. S-ino N. Holmes, London, Britujo
175. S-ino S. Persson, Malmö, Svedujo
176. S-ro T. Sjöblom, Stockholm, Svedujo

"Vi en la urbo, vi en urbeto,
En la malgranda vilaĝo,
Ĉu ne forflugis kiel bloveto
La tuta via kuraĝo?"

Jen la ciferoj kontrolitaj ĝis la 6-a de
Novembro :

Landoj

Nederlando	..	46843	Islando	..	4065
Francujo	..	31833	Hungarujo	..	3589
Britujo	..	27134	Portugalujo	..	3462
Ĉeĥoslovakujo	..	25422	Aŭstralio	..	3230
Bulgarujo	..	21992	Nov-Zelando	..	2540
Germanujo	..	19713	Svisujo	..	1882
Svedujo	..	17759	Egiptujo	..	1794
Norvegujo	..	13750	Maroko	..	1037
Jugoslavujo	..	11740	Grekujo	..	810
Danujo	..	9107	Palestino	..	505
Polujo	..	8105	Irlando	..	463
Aŭstrujo	..	7644	Urugvajo	..	460
Brazilo	..	6711	Kanado	..	359
Belgujo	..	6604	Hispanujo	..	276
Finnujo	..	6340	Hindujo	..	225
Usono	..	6254	Ceteraj lokoj	..	733
Argentino	..	6248			
Italujo	..	5844			304473

Okupoj

Artistoj	..	1788	Navigaciistoj	..	1051
Delegitoj Komunumaj	..	480	Parlamentanoj	..	216
Dentistoj	..	511	Policistoj	..	1960
Desegnistoj	..	1974	Presistoj	..	3037
Dommastrinoj	..	41623	P.T.T.-istoj	..	6622
Edukaj Aŭtoritatuloj	..	1058	Religiistoj	..	1347
Elektristoj	..	2665	Sciencistoj	..	1087
Farmaciistoj	..	1147	Sindikateĉefoj	..	413
Farmistoj	..	9134	Soldatoj	..	3107
Hotelistoj	..	1547	Studentoj	..	28571
Inĝenieroj	..	12547	Ŝoforoj	..	2164
Instruistoj	..	17299	Ŝtatoĉefistoj	..	7120
Juristoj	..	1383	Teknistoj	..	1313
Ĵurnalistoj	..	1059	Transportistoj	..	13664
Komerclistoj	..	52343	Urboĉefistoj	..	3348
Konstruistoj	..	5832	Vendistoj	..	8613
Kuracistoj	..	3969	Vestistoj	..	5517
Laboristoj	..	19521	Diversaj	..	18752
Lingvistoj	..	292			
Metiistoj Diversaj	..	20399			304473

LA PETSKRIBO

Per ĉi tiu numero ni registras la 300,000-an subskribon. Apenaŭ estas necese diri, ke tiu cifero, en ĉi tiu stadio de la kampanjo, ne nur ne estas cifero pri kiu la tutmonda Esperantistaro rajtas fieri, sed ĝi montras pli elokvente ol kia ajn argumento, ke la grandega plimulto de la samideanoj eĉ ne interesiĝas pri antaŭenigo de sia afero. Tiu cifero eĉ ne reprezentas la Esperantistojn en la mondo; ni ne parolu pri la ĝenerala publiko! Jen unu konkreta sed malgajiga respondo por tiuj, kiuj ne povas kompreni, kial Esperanto ne pli rapide progresas!

Interese estas fari komparojn inter ciferoj en antaŭaj numeroj. Ni kontrolu la Julian numeron (do fakte la ciferon de 6-a de Junio). En la sekvintaj 5 monatoj Nederlando liveris 216, Svedujo 1240, Norvegujo 1026, Danujo 6, Belgujo 936, Finnujo 115, Usono 7, Islando 0, Hungarujo 0, Portugalujo 39, Nov-Zelando 39, Maroko 0, Palestino 20, Irlando 0, Kanado 34. Pri aliaj landoj similrezultaj, ni tamen havas informon pri folioj kolektitaj, sed ankoraŭ ne senditaj. En tiu sama periodo Germanujo liveris preskaŭ 11000! Komento estas superflua.

32-a Universala Kongreso de Esperanto, Bern 1947

Pro ia teknika eraro ne aperis en la raporto pri la 32-a en numero 503, ke la Reĝa Helena Registaro oficiale delegis esti ĝia reprezentanto pioniron de Esperanto

D-ron Anakreon Stamatiadis,
al kiu ni direktas nian sinceran pardonpeton pro la ellaso.

En la raporto pri la Internacia Scienca Asocio Esperantista estis dirate, ke aliĝojn al tiu Asocio oni sendu al S-ro Woodruff. Tio estis eraro. Oni sendu aliĝojn al S-ro Jaroslav Hanuš, Kladno 1997, Ĉeĥoslovakujo.

TRA LA MONDO ESPERANTISTA

Aŭstrujo

La unua postmilita kongreso Esperantista okazis en Kufstein, Tirolo, 17–19 Oktobro. Ĉeestis proksimume 300 delegitoj kaj izolaj membroj de la supertendenca Aŭstra Esperantista Federacio. La registaro salutis la kongreson kaj diversaj eminentuloj ĉeestis la debatojn. La elekto de la nova komitato estis esprimo de fido al Direktoro Glüxmann, ree elektita kiel prezidanto de A.E.F. Kiel prezidanto de la Societo de la Amikoj de Esperanto estis elektita D-ro Maximilian Führung. Inter la akceptitaj decidoj kaj rezolucioj estu menciataj: Rezolucio por la demokratizoj kaj kontraŭ la faŝismo; decido aliĝi al U.E.A., post klarigo de la financa situacio; decido partopreni en la Balkanlanda Kontakt-Komitato (sub iuj kondiĉoj); rezolucio al la adreso de la Aŭstra Laborkomitato por pac-edukado, proponante aranĝi ĝeneralan paco-semajnon en Aŭstrujo.

Estu menciataj ankaŭ la fakkunsidoj, inter ili la laborista, kiu decidis formi Laboristan Frakcion de A.E.F., kaj la katolikaj Esperantistoj. Diservo katolika kun prediko en Esperanto. Belega ekskurso al la Saiser-valo finis la kongreson, kiu evidentiĝis la pravecon de la organiza formo de la Aŭstraj Esperantistoj: ne evitema neŭtraleco, sed superpartieco kun plena libereco por ĉiuj opinioj, kondiĉo de vere Esperantista unueco.

Brazilo

De la 13-a ĝis 21-a de Septembro 1947 efektiviĝis en S. Paŭlo la 11-a Brazilia Kongreso de Esperanto kiu kunvenigis Esperantistojn el preskaŭ ĉiuj ŝtatoj de Brazilo. Kiel en antaŭaj kongresoj, la Brazila Registaro helpis kaj apogis diversmaniere la Kongreson. Diversaj ministroj sendis oficialajn reprezentantojn, kelkaj Registaroj de Brazilaj Ŝtatoj sendis specialajn delegitojn, fervojoj de la Ŝtato S. Paŭlo donis senpagajn vojaĝojn al la kongresanoj.

La Kongresanoj vizitis la kleran urbon Campinas, kie en la 17-a de Marto 1906 estis fondita en Brazilo la unua Esperanto-Societo, nome Grupo Esperantista Suda Stelaro, fare de la pioniroj D-ro Johano Keating, kaj Ing. Tobias Rabelo Leite. Tiu grupo jam dum multaj jaroj dormadas, sed la Kongresanoj revivigis ĝin kaj balotis novan estraron. Loka Esperantisto tuj komencis kurson de Esperanto en la nova sidejo de la grupo.

Dum la Kongresa Semajno funkciis speciala poŝtoŝeĉejo uzanta stampilon pri la Kongreso, kaj bela ekspozicio de Esperantaĵoj en oficiala konstruaĵo.

La 11-a Brazilo Kongreso de Esperanto estis granda sukceso. I.G.B.

Ĉilio

La unuan fojon dum jaroj venis grava sciigo de ĉi tiu fora lando. Samideanoj en Santiago klopodas pri propagando de nia ideo kaj atingis rimarkindan sukceson. Esperanto jam estas instruata en du ŝtataj lernejoj, kaj sekve de penado de samideanoj S-ro René Garcia kaj Prof. Rabanales, oni sukcesis fari kontrakton pri instruado de Esperanto en la Someraj Kursoj de la Centra Universitato, kiuj komenciĝos en Januaro 1948. Tio estas precipe grava ĉar partoprenas la kursojn homoj el la tuta Sud-Ameriko. Ĉi tiu paŝo estas verŝajne la unua tiuspeca sur la tuta Sudamerika kontinento kaj la koncernataj laborantoj meritas sinceran gratulon. Por subteni ties laboron, kaj doni apogon al la instancoj, kiuj kuraĝigis oficialigi la aferon, oni sendu gratulleterojn grandnombre al la *patrono* de nia afero, S-ro Anibal Bascunán, Direktoro de Las Escuelas de Temporada, Universidad de Chile, SANTIAGO, Ĉilio, Sud-Ameriko.

Danujo

Post milito kaj okupado la internacia altlernejo en Elsinoro denove funkcias. La celoj konformas al la bazaj ideoj de Grundtvig, kreskigi homan solidarecon inter la diversaj nacioj kaj prepari spiritan internaciecon kiel nepran antaŭkondiĉon por politika internacieco. Reciproka toleremo estas nesribita leĝo.

Ekzamenoj ne ekzistas. Lernantoj mem elektas temojn indajn por studi. Lingvaj studoj, studrondoj kaj prelegoj pri internaciaj rilatoj okupas ĉefan parton de la tempo kaj ĉio estas konformigita al la lingva nivelo de la lernantoj.

La instruistaro estas plurnacia, kaj ordinare partoprenas 75 skandinavaĵ kaj 50 alinaciaĵ gelnernantoj en la vintraj semestroj, kiuj komenciĝas 3an de Novembro kaj 7an de Januaro. Someraj semestroj komenciĝas en Aprilo kaj specialaj kursoj sekvas.

La oficejo korespondas Esperante: adreso, Internationale Højskole, Danujo. Vintre kutime okazas Esperanto-kursoj por komencantoj; somere la danaj Esperantistoj disponas la lernejon dum kelkaj semajnoj por tre diversaj feriaj kursoj, kies sola lingvo estas Esperanto. Adreso por tiuj kursoj, kutime aranĝitaj por Julio, estas L. Friis, Ingemannsvej 9, Aabyhøj, Danujo.

La lerneja direktoro, Peter Manniche, simpatias al nia movado. Li deklaris, ke se multaj Esperantistoj venos al la lernejo, ili estos respektataj kaj grandparte povos aranĝi reciprokajn instruadon. Multaj Esperantistoj de diversaj landoj do povos kaŭzi oficialigon ankaŭ de

Esperanto, flanke de aliaj lingvoj, nun angla, germana kaj dana. Pripensu la eblon iri al Elsinoro profite al Esperanto kaj al vi mem.

P. Thorsen.

Egiptujo

La 12-an de Oktobro la gesamideanoj en Kajro formale bonvenigis inter sin S-ron John Robertson, kiu ĵus forlasis Svisujon por fariĝi Vickonsulo de Usono en tiu urbo (provizore en Port Said). La Peranto de U.E.A. D-ro Tados Megalli, faris salutparolon kaj oni pasigis tre agrablan vesperon. La ĉeesto de S-ro Robertson havis stimulan efikon, kaj oni povis konstati la novan ondon de entuziasmo kiu kaptis la lokajn samideanojn.

T.M.

Franco

Gravaj manifestacioj okazis en Parizo la 7-9 de Oktobro pasinta. Sesdek Esperantistaj fervojistoj el Nederlando reciprokis la viziton faritan dum la lasta Majo de Francaj Esperantistaj fervojistoj al Amsterdam.

Priskribi ĉi tie la entuziasmon, kiu regis dum tiuj tagoj, estas neeble, sed la samideanoj ja ne dubas pri la valoro de tiaj renkontiĝoj kaj pri la kora kamaradeco, kiu kreigas je tiaj okazoj. Oni devas tamen insisti pri la oficiala flanko de la manifestacioj.

Ekster la programo preparita de la franca fervojistaro, oni citu al oficialan akcepton de S-ro Flouret, prezidanto de la administra konsilantaro de S.N.C.F. (Franca ŝtata fervoja societo), kiu en la nomo de la ĝenerala direktoro de tiu societo, levis la glason al prospero de nia idealo kaj al amikeco franc-nederlanda. Ĉeestis la subsekretario de la nederlanda ambasadoro en Parizo.

Honorvino estis oferita, dum alia manifestacio, de S-ro Mollion, ĝenerala prezidanto de U.A.I.C.F. (Arta kaj Intelektala Unuiĝo de la francaj fervojistoj, oficiala fako de S.N.C.F.). Li laŭdis la studemon de tiuj simplaj laboristoj, kiuj oferis sian tempon por tiel nobla celo, kaj kiuj provas pliampleksigi sian scion. Tio estas la celo de la asocio, kiun li prezidas. Li tial ĝojis, ke la fervojistoj nederlandaj kaj francaj kunigas sur sama laborkampo.

Artan vesperon oni krome donis al la nederlandaj fervojistoj. Muzikis la orkestro de la *Cercle Rameau*, kaj oni ĝuis la virtuozecon de S-roj Morizot kaj Trouillet, ĝuis la gracian dancistino Paulette Cuenot. Kompletigis la programon S-ino Sautreuil de la Franca radio, S-ino Margarineta, fantaziulino, kaj Raymond Schwartz, ĉiuj bone konataj al la Esperantistaro.

Germanujo

Ni legas en *Ausland* (Eksterlando) de la 6-a de Septembro, gazeto aperanta en Günzburg, Bavarujo, kaj traktanta aferojn de senlanduloj, artikolon pri Esperanto inter oficistoj de la senlandula organizaĵo.

Kurso en Geislingen montris, kiel multe da homaj deziroj pri kunlaboro vaniĝas pro manko de komuna lingvo. La kurson ĉeestis Estonoj, Litovoj, Poloj, Ukrainoj kaj Hebreoj. La lecionoj estis donataj germanlingve, kiun lingvon komprenis nur unuopuloj. Ĉi tiun staton de aferoj emfazis juna ukraina poeto Z. Herasymovyč, kiu detale informis la kursanojn pri la Esperanto-movado. Li precipe montris la grandan signifon kaj utilon de la mondlingvo por rifuĝintoj kaj elmigruloj.

Hungarujo

Dum la jarkunveno de la Vegetara Societo en Budapeŝto oni laŭtleĝis salutleteron de la Ĉefdelegito de U.E.A. kaj tio donis okazon al ĉeestantaj Esperantistoj fari mallongajn paroladojn pri Esperanto. La Societo en cirkulero oficiale alvokis la atenton de siaj membroj al la uzado de Esperanto.

La Socialdemokrata vicurbestro de Budapeŝto denove eldonis ordonon pri kursoj aranĝataj por pedagogoj en la edukscienca instituto, kies partoprenantoj poste povos instrui Esperanton en lernejoj de la Hungara ĉefurbo. Ankaŭ la Popoleduka Centro de la ĉefurbo anoncas Esperanton en kelkaj vesperaj kursoj.

Okaze de la jubileo de Esperanto, en la Sindikato de la Presistoj en Budapeŝto oni prezentis interesan kaj ampleksan ekspozicion de lingvo. La 13-an de Oktobro, Jozefo Szathnár, verkisto, laŭtleĝis en la hungara radio pri la prauloj de Esperanto.

U.E.A.-delegito en Miskolc, Profesoro L. Kiraly, aranĝis dum Kultursemajno de la urbo Esperanto-ekspozicion, kiun vizitis 4000 homoj.

En urbo Nyiregyháza, ĉe la malfermo de Vinber- kaj Frukto-ekspozicio la salutparoladon al svisaj gastoj faris F-ino Hemma Lupkovics, en Esperanto. Prof. J. Kondor, U.E.A.-delegito, faris propagandon en 3 gimnazioj kaj kelkaj profesoroj sin anoncis por kurso. Unu el ili povis ricevi delonge serĉatan libron pri matematiko pere de Esperanto.

Venezuelo

El Universal, loka gazeto en Caracas, anoncas en granda artikolo sub formo de intervjuo, fondon de Esperanta Grupo en ĉi tiu urbo. Ni deziras sukceson al la kurso, gvidata de Prof. Félix Angel Losada, kaj al la grupo.

Scienco

Internacia Scienca Asocio Esperantista sukcesis starigi reton de landaj delegitoj en 12 landoj kaj nun havas preskaŭ 300 anojn en 28 landoj. Plej nombraj kaj aktivaj estas filiaj organizaĵoj en Britujo kaj Nederlando.

Jam nun I.S.A.E. povas fari utilajn servojn al ĉiu sciencisto kiu deziras ricevi diversajn informojn pri sia scienca fako, resumon aŭ tradukon de grava artikolo k.s. La petanto bonvolu turni sin al la landa delegito kaj aldonu unu respondkuponon. Por la tradukoj kaj resumoj ni pretigis tarifon, laŭ kiu ĉiu servo estu pagata. Ni konsilas al niaj anoj, ke ili funkcii kiel fakaj delegitoj de U.E.A. La Esperantista scienca servo tiel efike helpos nian propagandon inter sciencistoj ne-Esperantistaj.

Provizore ni povas nenion diri pri la *Scienca Revuo* kaj ni petas, ke la abonontoj estu paciencaj.

Ni petas, ke la I.S.A.E.-anoj afable ekrilatu kun la koncernaj landaj delegitoj kaj helpu ilin starigi filiajn organizaĵojn. Por 1947 la anoj ne pagos kotizon al I.S.A.E., sed se iu deziras donaci sumon, bonvolu sendi ĝin al la koncerna landa delegito aŭ al la centra oficejo.

Dume funkcias en I.S.A.E.-Estraro, samideanoj Stöp-Bowitz, Woodruff, Makkink, van der Lek kaj Hanuš.

Listo de Landaj Delegitoj de I.S.A.E. :

Britujo : E. D. Durrant, 18 Romeyn Road, LONDON, S.W.16

Nederlando : G. F. Makkink, Eekhoornlaan 10, BENNEKOM

Franujo : E. Francois, 1 Allée du Rond Point, ORLY, Seine

Usono : Prof. L. Ware, 311 Melrose Court, IOWA CITY, Iowa

Norvegujo : C. Stöp-Bowitz, Stensgt. 22b, OSLO 34

Italujo : Prof. G. Canuto, Ospedale Maggiore, PARMA

Svedujo : Västmannagatan 71 B II, STOCKHOLM

Jugoslavujo : M. Gjivoje, Savska cesta 19 II, ZAGREB I

Danujo : A. Glud, Ved Sønderport 22, KÖBENHAVN S

Bulgarujo : Prof. S. Ĝugev, str. Parĉević 13, SOFIA

Aŭstrujo : Prof. H. Sirk, Baumgasse 26, WIEN III

Polujo : J. Toczyski, Morska 77, GDYNIA

Hungarujo : G. Bodnár, Bajczy Zsilinsky ut. 60, BUDAPEST V

Germanujo : C. Dellian, Augustenstr. 40/3, MÜNCHEN 2, US Zono

Ĉeĥoslovakujo : M. Litera, Kladno 3, Koněvova 3

Argentino : L. Musih, Boycá 441, BUENOS AIRES

Nov-Zelando : A. L. Ferguson, 42 St. Georges Bay Road, Parnell, AUCKLAND

Tarifo por TS kaj RS :

Numero de paĝoj de petita artikolo ĝis 40-liniaj	Takso en rpk por : Resumo	Traduko
1	3	5
2	6	10
3	9	15
4	12	20
5	15	25

por resumita paĝo 3 rpk, por tradukita paĝo 5 rpk. Pliaĝaj resumoj aŭ tradukoj laŭ tarifo aŭ laŭ propra interkonsento. La pago okazas rekte per respondkuponoj aŭ en landa valuto, al koncernata landa delegito.

Pro I.S.A.E. :

Jaroslav Hanuš, Sekr.,

Kladno 1997, Ĉeĥoslovakujo.

Rotarianoj

Dum Rotariana lunĉo en Bern, dum la Universala Kongreso tie, Rotariano M. Lewin parolis kiel reprezentanto de la Rotaria Klubo en Dunstable, Anglujo, kaj transdonis belan ŝildon el plastikaĵo, sur kiu montriĝis la Rotari-Rado kaj la Verda Stelo, kaj konforma surskribo.



Skolta Bulteno de Societo Misr : Ĉi tiu bela revuo denove aperigas longan artikolon pri Esperanto fare de U.E.A.-delegito en Kafr El Daŭar, Egiptujo, S-ro Mohamed Ali Chérif.

Le Mur des Langues vous sépare : multkolora afiŝo 59.5×40 cm. de SAT-Amikaro, 67 Av. Gambetta, Paris 20, Francujo : prezo 20 fr.

Singapore

Por festi la 60-jaran ekziston de Esperanto la Publika Lernejo Hou Chio okazigis Esperanto-ekspozicion en dimanĉo la 13-a de Julio.

Tre multaj vizitantoj venis por rigardi la cent diversajn Esperanto-gazetojn kaj centojn da bildkartoĵoj el 31 landoj. Krome troviĝis multaj libroj kaj broŝuroj, gramafondiskoj aŭdigis "La Espero" "Tagiĝo" kaj aliajn Esperanto-kantojn.

En *Nan Chiau Jit Pau*, unu el la plej grandaj ĉinaj ĵurnaloj en Malajo, aperis speciala artikolo pri Esperanto.

Korespondado kaj Germanujo

Unu membro nia atentigas, ke tre multaj Germanoj skribas al Esperantistoj en la eksterlando, sed ne ricevas respondon. Oni inklinas kredi, ke tio estas intenco, kaj ne nura hazardo. La menciita samideano volas emfazi, ke en Germanujo nuntempe la fidelaj samideanoj havas la taskon rekonstrui sian movadon, kaj samtempe konigi la idealon de mondopaco pere de Esperanto. En la nuna tempo la entuziasmo por Esperanto, kiel unuaranga rimedo por krei amikan senton inter la popoloj de la mondo, estas tia, ke oni esperas profiti tion por servi la du idealojn. Tial, oni petas, ke samideanoj en la eksterlando respondu, kaj korespondu kun Germanoj por ne seniluziigi la novulojn, kiujn oni varbis per la bela idealo de frateco.

Apogante la peton de la Germana samideano, la redakcio volas atentigi, ke en tre multaj landoj ankoraŭ ne estas eble skribi en Germanujon kaj tial petas, ke tiu fakto estu klarigata al la korespondemuloj por ke ili ne havu malveran impreson pri la Esperantista familio.

Maristoj

La unua postmilita Internacia Kongreso de Esperantistaj Maristoj okazos en Fecamp apud Le Havre, Francujo la 29-30 de Majo 1948. Kongreskomitato starigas ampleksan programon kaj ricevas ĉiujn oficialajn helpojn. Speciala kurso por Fecamp'aj policistoj estas organizata. Petu informojn de S-ro Delamare, 32 str. Alex-Legros, aŭ de Turismoficejo, ESSI, Fecamp, (Seine Inf.) Francujo.

Literatura Konkurso por Junuloj

Sub patronado de la Tutmonda Ligo por Internacia Amikeco per la Eklezio oni starigas konkurson por junuloj kaj proponas multajn gravajn monpremiojn. La konkurstemo estas en la kadro de la ĝenerala temo *Kristo kaj la Universala Frateco*. Ĉiujn detalojn oni povas ricevi de la sekretario, 37 quai Wilson, Genève, Svisujo.

Vicprezidentino de Hungara Parlamento parolas pri Esperanto

Okaze de la jubilea festkunveno de la Hungarlanda Esperanto-Societo, aranĝita en la Muzeo-Halo de la Parlamento, la vicprezidentino de la Parlamento, socialdemokrato Anna Kéthly, kiu nun festas 25-jaran socialdemokratran laboron, alparolis la ĉeestantojn pri la socia rolo de Esperanto. Ŝi prezentis la politikan, ekonomian kaj diplomatan ludadon, kiu nun okazas ĉirkaŭ tria mondmilito kaj emfazis la neceson plikunigi la popolojn por krei pli bonan komprenon. Tian reciprokajn komprenon povas efektiviĝi nur Esperanto.

Prezidanto de H.E.S., Prof. Kókény, parolis pri la viktimoj en la Esperanto-movado, de la faŝismo, pri la klopodoj enkonduki Esperanton en la lernejojn por la intereso de la tutmonda laboristaro, kaj emfazis, ke tio devos sukcesi, eĉ se kelkaj gravaj personoj ne rekonas la unikan rolon de la mondlingvo.

Parolis ankaŭ Julio Baghy kaj Kalomano Kalocsay.

P.B.

Maksimafilo

Kreskas la nombro da filatelistoj, kiuj kolektas bildkartoĵojn kun la sambilda poŝtmarko alfiksa bildflanke, kaj kun stampo kiu havas rilaton al la bildo sur ambaŭ. La nomo de tiu fako de la filatelo estas *Maksimafilo*. La franca societo *Union Maximaphile Internationale* en Dijon sin okupas pri ĉi tiu fako kaj uzas, inter aliaj lingvoj, Esperanton.

Interesatoj sin turnu al: Esperanto Kultur-Servo, Budapest III, Jolsva u. 4, Hungarujo.

ESPERANTISTA VIVO

Naskiĝo

Kopasz—Al D-ro Kopasz, FD en Szeged, Hungarujo, kaj ties edzino, naskiĝis la 3-an de Oktobro, filineto Agnes.

Régulo Pérez—Al S-ro J. Régulo Pérez, Delegito en La Laguna, Kanariaj Insuloj, kaj al ties edzino, naskiĝis unua infano, filino nomita Maria, la 12an de Oktobro.

Veldhuyzen—Al E. J. Veldhuyzen, delegito en Delft, Nederlando, kaj ties edzino, naskiĝis la 5-an de Novembro fileto Niels Harald.

Tre sinceran gratulon.

Niaj Mortintoj

Ni sciigis pri la forpaso de la jenaj samideanoj. Al iliaj familianoj ni esprimas nian profundan kondolencan.


Braam—S-ro Th. Braam, membro en Almelo, Nederlando, je la 8a de Oktobro.

Elder—S-ino A. S. Elder, membro en Blackshields, Skotlando, je la 22a de Aŭgusto.

Jacks—Je la 8a de Novembro forpasis S-ro Harry Jacks, iama laboranto en la oficejo de I.E.L., kaj tre fervora propagandisto, post longa malsano.

TRA LA LIBRARO

*=akireblaj ĉe I.E.L.



***Tri Majstro-noveloj:**
tradukitaj de E. Pebe: eldonis
Tramondo Vieno. Broŝ. 32 p.
20.5×15 cm.: prezo 3 ŝil.,
afranko 1p.

El la tri rakontoj en ĉi tiu libroto nur unu mi senhezite nomus *majstro-novelo*. *La tertremo en Ĉilio* de Heinrich von Kleist havas pezan stilon; kaj *La Flugo per la Kondoro* estas nur tripaĝa fragmento, ne sufiĉe longa por permesi formadon de fidinda opinio pri la meritaj de la novelo *La Kondoro* de Adalberto Stifter, el kiu ĝi devenis.

Nur *Veroniko* de Theodor Storm, kvankam verkita en la pasinta jarcento, havas aktualan kaj absorban temon. Ankoraŭ nun katolika edzino, kiu pekete kontraŭ la edzo, povas trovi konfeson al sia edzo pli facila ol konfeso al sia eklezio. Sed kiom da edzoj havas la toleremon kaj malĵaluzon de ŝia admirinda edzo?

La tertremo en Ĉilio havas ekscitoplenan enhavon—monaĥino naskas infanon, tertremo ruinigas urbon, fanatika homamaso masakras sendistinge kulpulojn kaj senkulpulojn. Sed la stilo ne taŭgas por tia rakonto de kataklismo kaj krueleco. Eĉ tertremego ne povus tremetigi la masivajn blokojn de ĝiaj longaj frazoj. Participoj abundas, kaj alineoj malmultas. Eble la kulpulo apartenas ĉefe al la originala verkinto, ĉar la stilo de la du kromaj noveltradukoj estas sufiĉe malpeza kaj flua. Tradukanto ja ne rajtas ŝanĝi la esencon de verko, sed tamen li povas fari la tradukon pli leginda ol la originalo. Ĉu Zamenhof ne pruvis tion?

La fragmento el la *La Kondoro* priskribas la suprenleviĝon de balono. Ĝi bone pentras la alimondajn sentojn de ŝvebanto en la spaco kaj la eksterhoman belecon tie.

Preseraroj tute mankas. La kelkaj eraretoj—*oleomonto* (p.24) *Lukaso* (p.25) *relikujo* (p.26) *pergamentojn* (p.30) kaj *ĵus* anst. *tuj*—verŝajne estas eraroj de la tradukinto sed ne de la eldonejo.

E. P. Ockey.

***La Nevenkebla Ĝeno:** de Theo Thijssen; el Nederlanda lingvo trad. F. Faulhaber; eld. Libroservo Asocio de Laboristaj Esperantistoj F.L.E.: bind. 20.4×14 cm.: 319 p.: prezo 9 ŝil. 6p., afranko 6p.

La ĉiama sinokupo de patrinoj, taŭge kaj dece vesti la kreskantan aron de idoj tradicie estas neenviinda ekskluzivaĵo de la malriĉuloj; sed sekve de la porciado kaj uzado de kuponoj, la

tualetaj embarasoj de la civilizita (!) homo lastatempe fariĝis pli universalaj, kaj en la nuna tempo estus malfacile trovi en Eŭropo homon, kiun ne tuŝas la problemoj, dece sin vesti.

Ĉi tiu verko, kies memstarajn ĉapitrojn ligas fadeneto de komuna intereso pri la ĝenaĵoj de unu homo rilate al la vestoj, tial nepre posedas ĝeneralan allogon. Precipe en la unuaj ĉapitroj, kie la aŭtoro prezentas la embarasojn kaj turmentigojn de juna knabo, kiu devas sin prezenti antaŭ siajn kamaradojn en aligitaj vestoj de pliaĝuloj, oni admiras la ĝenan klarvidon en la psikologion de la infano. Kiom la patrinoj komprenas siajn infanojn; sed kiom da subtilaj pensfluoj evitas ilian perceptemon!

En la verko troviĝas multe da bonhumoro, malgraŭ tio ke ĝi prezentas fazon de la vivo produktitan de la malabundo, de la malriĉeco kaj la ĉiutagaj zorgoj de la laborista klaso. Arte, ĝi staras meze inter la malpezaj, nure distraj legaĵoj kaj la serioza, vere grava literaturo. Dum la aŭtoro distras nin kaj tiklas nian humoresenton, li samtempe sukcesas bildigi al la leganto multajn facetojn de la nederlanda vivo, kiuj siavice vekas nian intereson, nian ravyon kaj nian kompaton. *La Nevenkebla Ĝeno* estas bonvena aldone al nia internacia literaturo kaj inda aldone al la serio, jam fama, en kiu ĝi aperas.

La tradukinto kaj la kontrolo instanco *Literatura Komitato de F.L.E.* bonege plenumis sian taskon, disponigi al la Esperanta publiko efektive legindan kaj havindan libron. Lingve kritikindaj eroj preskaŭ ne ekzistas en ĝi, kaj mi volas fari mension pri nur unu uzado, kiu al mi ŝajnas tuŝi principon de uzo. Temas pri la uzo de *duona* kiu aperas plurloke, ekzemple *duona horo*. Tiu formo populariĝis nur dum la pasintaj du-tri jaroj. Mi vidis ĝian kreskon, sed mi konfesas, ke la ideo *duona horo* estas io tute ekster mia imagkapablo. Por mi *horo* estas tuta objekto. Se oni faras dividon, ĝi jam ne estas *horo*; *duonhoro* jam estas tradicia, kaj *horduono* havas la apogon de tiuj, kiuj volas apliki la *analizon de renversebleco* ĉe sia derivado. Kial do enkonduki formon kiu respondas nek al la ĝenerala bezono nek al la logiko. En la okazo, ke oni volas fari dividon, sole rekomendinda estas *hora duono*; sed kial fari dividon?

Preso kaj aspekto de la libro estas bonaj, kaj mi rekomendas la verkon.

M.S.

Idioma Internacional: Informes del Instituto de Esperanto Montevideo. Serio el 6 broŝuroj en hispanlingvo kun celo konigi la argumentojn por Esperanto. Tre kompetente farita.

JE PRIPENSADO KAJ PRIJUGO DE LA TUTMONDA DEMOKRATA ESPERANTISTARO

Sub la ĉi-supra titolo Estrarano de U.E.A., D-ro Ivo Lapenna, konigas sian opinion pri la 32-a Universala Kongreso de Esperanto. Spaco ne permesas al ni represi la artikolon, skribitan kun la konata vervo de nia energi plena samideano. La artikolo aperis en la numero 13-14 de la periodaĵo *Internacia Kulturo*, aperanta en Sofia.

Ni diru tuj, ke la kritiko estas subjektiva, laŭ la maniero de la *teruraj simpligantoj*, kiel sprite diris franca politikisto. Se ni respondas ĉi tie, tio estas por sekvi la malnovan principon *Vi aŭdu ankaŭ la alian flankon*.

I. Kritikoj ĝeneralaj

Samideano Lapenna ironie parolas pri la manko de Esperantistoj en la stacidomo en Berno, fakto plendinda, sed komprenebla. Dum la milito pasinta ni en Svislando havis aĉan situacion pro la forta propagando de *Basic English* (Baza anglalingvo) kaj de alia sistemo. Ĉiuj kuris al kursoj de ĉi tiu kripligita anglaĵo kaj estis senutile elspezi monon kaj tempon por propagando kaj kursoj, kion ĉiuj juĝis maloportuna. Tio, kion samideano Lapenna verŝajne ne scias, estas, ke dum la tuta milita tempo kvarono de la popolo estis mobilizita kaj la streĉo por respondi al eventuala atako estis granda. Aliaj kondiĉoj, kiujn ni ne citas ĉi tie, grave malhelpis societan vivon.

Alia kritiko direktiĝas kontraŭ la programo. Diservoj ekzemple kaj la tielnomitaj *fakaj* kunvenoj estas menciitaj. La granda plimulto de la kongresanaro aprobis senrezerve la diservon en la Katedralo. Pri la ceteraj, samideano Lapenna mem diras en sia kritiko "ĉiu homo rajtas konfesi sian religion." Ke la diservo estas en la oficiala programo de la kongreso, estas tradicio. Kiu ne volas ĉeesti, simple ne ĉestu!

La kritiko pri la fakkunsidoj estas prava rilate al la vorto *fako*. Oni povus diri ekzemple, kunveno de specialistoj aŭ io simila. Ĉi tiuj kunvenoj estas en la okulo de *intelektulo kaj juristo* io nekonforma al lia menso, kaj ĉio kio ne estas konata aŭ ne komprenata devas esti *stranga*.

La kritiko pri la fakaj kunvenoj (ni konservas la esprimon) neniam ĉesis. Ne estas la tasko de la Estraro de U.E.A. interveni, dikti, ordoni. Spertinte ĉi tiun mankon de scienco, de vera faka afero, eminenta Esperantisto, D-ro Edmond Privat, iniciatis la Sumeran Universitaton dum la kongreso en Genève 1925. En ĉi tiu Somera Universitato fakuloj parolis pri difinitaj temoj kaj okazis diskutado. Samideano Lapenna ja partoprenis la kunvenon de la Estraro de U.E.A. en

Bern, dum kiu oni akceptis proponon de la nuna prezidanto de U.E.A., ke en Malmö okazu preleĝoj fakaj. Oni povus ja kritiki ekzemple samideanon Lapenna pro tio, ke *li* ne organizis kunvenon de juristoj. Ni, sciante, kiom devas labori aktiva Esperantisto dum la kongreso, tion ne faras.

La plej severa kritiko direktiĝas al iuj personoj plenaj je fervoro, kiuj opinias, ke oni devas dokumenti la apartenon al Esperanto per aparta vestaĵo, per multaj verdaj steloj kaj similaj esprimoj de troa fervoro. Nu, tio ne estas io nova kaj ankaŭ nenio specife Esperantista. Kiu ĉeestis aliajn kongresojn (kaj ni en Genève havas eble pli multe da sperto ol la kritikinto) ne miras pri la stranga aspekto de iuj delegitoj al la internacia kongreso. Certe por seriozulo, kia estas samideano Lapenna, tio ne estas tolerebla, sed ĉu pro tio ni malpermesu al iuj veni al la kongreso?

La fina observo estas pri la lingvo. La kritikinto trovis, ke multaj parolas la nacian lingvon kaj malpli aŭ nebone Esperanton. Mi mem havis ĝuste la kontraŭan impreson, kiam sabaton vespere mi venis al la granda kelo. Jam en pasintaj kongresoj, antaŭ ĉi tiu lasta milito kaj antaŭ la unua mondmilito, oni kritikis ĉi tiun aferon. Rimarkinde estas, ke inter la plej internaciemaj Esperantistoj, la S.A.T.-anoj, oni konstatis similan fenomenon en la kongreso en Aarhus 1947. Ni legas ekzemple en *Sennaciulo*, Oktobro 1947, la jenan frazon:

"Kaj li plendas pri la kvalito de la kongresantoj. Li riproĉas aŭdi tiom da ne-Esperanto; ankaŭ li estis iam komencanto. La pli spertaj helpu, kaj estontece la karavanestroj ne akceptu ne-Esperantistojn."

Resumante ĉi tiujn ĝeneralajn kritikojn ni opinias ke ja devas esti bona ideo nia Esperanto. Tiom da supozataj aŭ veraj mankoj, fuŝaĵoj, strangajoj ne sukcesis detrui ĝin. Filozofia spirito venas al alia konkludo: universala movado kiu varbas siajn adeptojn el ĉiuj klasoj de la homa socio, devas naturdevige kalkuli je tiaj aĉeraĵoj. Se ni ĉiuj estus absolute senmankaj, laŭ samideano Lapenna, ja restus nenio por kritiki. La malbono devas ekzisti por rekoni la bonon!

II. Kritikoj kontraŭ Komitato de U.E.A.

Sinjoro Lapenna diras:

"La Komitato de U.E.A. timas la vorton *atakmilito*." Ĉi tie ni devas citi la tutan kritikon: "Ĉiu normala homo en la mondo scias hodiaŭ,

ke la hitlera Germanio provokis la duan mondmiliton, ke tia milito estas konsiderata en la moderna internacia juro kiel krimo. Tamen la komitato de U.E.A., restante fidela al sia "Neŭtraleco" rifuzis eĉ la vorton *atak milito*."

Laŭ tio, la tuta U.E.A.-komitato, minus sep kiuj aprobis la tekston de samideano Lapenna, estas nenormala! Nu, neniuj ili pro ĉi tiu ĝentila komplimento ĉagreniĝos. Sed pri kio temas, do? En ordinara administra teksto devus aperi la vorto *atak milito*. Nome, ke el la farota helpo al suferantaj landoj, profitu unue la atakitaj (kiujn atakis Germanujo). Pri tio ni ja ĉiuj konsentis. Sed ni ne volis, ke aperu ĉi tiu vorto. Ĉi tiu diskuto estis senutila balasto kaj mi mem voĉdonis kontraŭ la propono de D-ro Lapenna ĉar simple min naŭzis ĉi tiu kverelo.

Rilate al la germanoj, kaj ni estu precizaj—germanaj Esperantistoj—nia vidpunkto kaj tiu de amiko Lapenna neniel diferencigas. Ni ne akceptas iun, kiu sin ligis kun la Naziismo aŭ Nazi-faŝismo. Punkto, fino.

Fine samideano Lapenna kritikis iujn detalojn de la nova statuto de U.E.A. Estas rimarkinde, ke pri ĉi tiu plej grava ero de la kunfandiĝo, la kritikinto ne memoras la dokumentojn, kiujn li ricevis de la tiamaj I.E.L.-Centro. Ĉio, kion li kritikis, estas afero de KONTRAKTO, kiu ligas ambaŭ partiojn. Temas pri transira stato, kiu finiĝos kiam plenumiĝos la kondiĉoj. Ĉi tiu tuta afero solviĝos eble pli rapide ol ni supozis. Sed ni devas atentigi samideanon Lapenna, ke ekzistas kondiĉoj, kiujn nek li nek ni povas ŝanĝi. Oni konsilis al ni procedi tiel por certigi nin (t.e. la Asocion). Cetere, ĉar juristo Lapenna opinias, ke ni ne konas leĝaron kaj malkonas demokration, li diru al ni kiel li agus kontraŭ la leĝoj de iuj ŝtatoj, kiuj malebligas, ke U.E.A. en Genève ricevu sian havajon!

La prezidanto de U.E.A., samideano Malmgren, prave rimarkigis: "La statuto (de la nova U.E.A.) estas afero de konfido." Jes, tia ĝi estas. La Estraro de la estinta U.E.A. fidis al la Estraro de I.E.L.; ĉi tiu komprenis la situacion kaj akceptis iujn kondiĉojn, kiujn diktis la cirkonstancoj kaj kondiĉoj de la postmilito. Jen ĉio.

Ie, samideano Lapenna kritikis la komitatanojn ĉeestantajn en Bern, ke ili ne konis la statuton. Tio estas nur duono de la vero. La alia duono estas, ke iuj komitatanoj ne tuj komprenis pri kiu paragrafo temis. Cetere, ĉu la kritikinto mem neniam ĉeestis parlamentan kunsidon, dum kiu la anoj ne tuj kaptis la sencon de iu diskutobjekto? Riproĉi la Komitaton de U.E.A. pro tio, estas minimume manko de kamaradeco.

III. Kritiko pri manko de demokrateco

La plej rimarkinda afero estas la ripetataj kritikoj pri manko de demokrateco. Ĉi tio estas la konata kanto kontraŭ okcidentaj landoj. Ni opinias ĉi tiun imitadon de politikaj konversacioj inter oriento kaj okcidento superflua en nia movado. Ni estas societo, ne ŝtato. Ni dependas de la bonvolo de ĉiuklasaj homoj, kiuj venas pro diversaj motivoj al Esperanto. Ni vidas antaŭ ĉio la homon; lia religio kaj lia politika kredo aŭ opinio ne koncernas la Asocion, krom se ĝi kontraŭas la statuton de U.E.A., kiu klare deklaras la elementajn homrajtojn kiel unuan kondiĉon de sia laboro. Tio signifas, ke ni ne akceptas ekzemple Nazi-faŝiston en U.E.A.

Ĉi tiun devojiĝon de la diskutado en pure politikan sferon ni simple bedaŭras. La propono de la rezolucio en Bern jam estis mispaŝo. Ĉi tiu vojo kondukas al nova skismo, pli danĝera ol la pasinta. Ekzistas nun diversaj opinioj pri demokratio kaj demokrata procedo. Sen la intenco doni lecionon pri tio, ni nur rimarkigu al la kritikinto, ke regno leĝdonas kaj leĝplenumas per siaj organoj. La leĝplenumanto posedas la povon kaj respektigas decidojn. En internacia societo, dependa de la bonvolo de la anaro, Estraro de Komitato procedas laŭ la statuto. Sed, kaj tie diferencas la du, societo ne povas devigi iun per forto, plenumi ion, ekzemple pagi kotizon (imposton). Se juristo Lapenna deziras apliki la efektivan demokration, ekzemple la referendumon kaj iniciatan demokration svisan, en kiu ĉiu grava decido de la registaro estas submetata al la popola voĉdonado, tiam li devos trovi rimedon per kiu voĉdonantaj membroj portu ankaŭ la materian respondecon. La nuna statuto de U.E.A. respondas al faritaj spertoj. De 1910 oni senĉese diskutadis, ŝanĝis statutojn, revenis al estintaj formoj k.t.p. Ĉi tiu ludado neniel progresigis nian movadon. Por eksterulo ĉi tiu diskutado pri formo de demokratio ŝajnas ridinda.

Unu pozitivan frazon ni tamen trovis en la serio de kritikoj:

"Niafare, ni ripetis, ke ni—restante membroj de U.E.A. kaj fidelaj al la principo de unueco—ankoraŭ pli energie daŭrigis la klopodojn por demokratigo de nia tutmonda organizado kaj ni estas certaj ke ni trovos ĉiam pli kaj pli da kunbatalantoj en la tuta mondo. Per Esperanto por la progreso por la paco, kontraŭ la faŝismo kaj nacia aŭ rasa malamo!"

Mi aldonas al tio, por ke la cetera mondo kredu nin, ni efektivigu unue la pacon inter ni!

Hans Jakob (svisa demokrato).

ENIGMA KONKURSO N-ro 22

Solvojn oni sendu al S-ro P. H. Mooy, 106 rue Général Lotz, Brussel-Uccle, Belgujo

Ĉi tiun fojon ne estas gajnintoj ĉar la 18-a konkurso ne enhavis enigmojn.

Solvoj de la enigmoj en Konkurso N-ro 20.

N-ro 46 : Doktoro Esperanto, Lingvo Internacia. Slosilvortoj : idilio, dozilo, akanto, stagno, korvoj, oriole, solida, ternas, esotera, spleno, metriko, trinki, panamo, iniciati, atripolo, pokalo.

N-ro 47 : 1. Gerbrando, ĉar lia duonfrato Frederiko (Johano) estas, kiel duonfrato de Helena, la onklo de lia fratino, aŭ ĉar lia duonfrato Hermano (Fernando) estas, kiel duonfrato de Karlo, la onklo de lia patrino. 2. Hermano kaj Fernando, kaj ankaŭ Johano kaj Frederiko, la malo de 1. 3. Rosa. Hermano kaj Fernando flanke de la patro, Johano kaj Frederiko flanke de la patrino. 4. Karlo Jansen kaj Fabo (la patro de Petro). 5. Frato(duon) aŭ praonklo (ĉar ŝia patrino estas nevino de Fernando). 6. Nenion, ĉar Violetta jam mortis antaŭ ol Luiza naskiĝis.

Enigmo N-ro 50 : Ĉi-sube sekvas 19 paroj da vortklarigoj. La unua klarigo el ĉiu paro ĉiam rilatas al seslitera vorto, la dua ĉiam al kvinlitera vorto. La du vortoj el ĉiu paro havas kvin komunajn literojn. La sesaj literoj formas en la sama sinsekvo la plej gravan okazintaĵon aktualan en la Esperanto-movado. 1. malpaca agado—pacama homo ; 2. malgranda malluksa konstruaĵo—granda ofte luksa konstruaĵo ; 3. signo de maljuneco—ŝtofo el delikata lano ; 4. spirorgano de fiŝo—materialo por hejti ; 5. rilate al pluraj samtempe—malesto ; 6. se vi bone faras tion, vi solvos la enigmon—unu el la celoj de komercisto ; 7. maniero por kuraci reŭmatismen—tia ĝemelo estis fama ; 8. preĝejo por araboj—resumo ; 9. monunuo—monunuo ; 10. soleca piulo—arbeta kun ĉiamverdaĵ folioj ; 11. pika vegetaĵo—preskaŭ ne plu Eŭropano ; 12. alkonstruita plataĵo al grandaj domoj por ĝui belvidon—ĉiela korpo ; 13. mallibera homo—substanco per kiu abeloj konstruas siajn ĉelojn ; 14. ĉeso de laboro—maniero por prepari viandon ; 15. kartludo—spaco apud domo ; 16. militista rango—markrustulo ; 17. turmentema—instruita ; 18. haŭtsvelaĵo—paŝtobesto ; 19. arbo — brila fadeno sekreciita de speco de ratipo.

Enigmo N-ro 51 : Johano, Petro kaj Vilhelmo edziĝis la saman tagon kun Mario, Anjo kaj la blonda Linjo. Cetere, ni scias ke : (a) Unu el la lastaj tri estas fratino de Petro, kaj unu jaron pli aĝa ol Mario ; (b) Unu el la unuaj tri estas

frato de Linjo, kaj la kuracisto, kiu ekzamenis Johanon por asekuro ; (c) La advokato Petro edziĝis kun brunulino. Kiuj estas la geedzoj ?

Filatelio

La Ĉiujara Kongreso de Internacia Asocio de Poŝtmark-Kolektantoj okazis en Londono la 25-an de Oktobro. Posttagmeze okazis la Aferkunsido de la Asocio kaj aŭkcio.

Post temanĝo, eksterlanda invitito, S-ro Bontje el Haarlem, Nederlando, faris mallongan prelegon pri la fabrikado de poŝtmarkoj kaj nederlandaj poŝtmarkoj dum la okupado. S-ro M. Stuttard faris tradukon en anglan lingvon. Pluraj Esperantistoj partoprenis la kunsidon.

Oni anoncis, ke la unua preskvanto de la *Internacia Katalogo* tute elvendiĝis jam post tri semajnoj. Oni denove presigas.

Junularo

World Friendship Association
(Tutmonda Amikeco-Asocio)

“Ni sufiĉe spertis pri *scipovo* de naciaj lingvoj ĉe niaj junaj vojaĝantoj. Ni ne povas solvi la lingvan problemon, kaj Esperanto ja estas unika ĉar oni povas praktiki ĝin en kiu ajn lando.” Tia estis la parolo de la ĝenerala sekretario de W.F.A., K. Helveg Petersen, kiam Dana Esperantista Komun-Komitato antaŭ nelonge sukcesis fari la jenan interkonsenton :

W.F.A. starigos vojaĝ-grupojn de junuloj lernintoj Esperanton. Similaj grupoj stariĝu helpe de la Esperanto-organizaĵoj en eksterlando. La grupoj vintre studu la lingvon kaj korespondu, somere vizitu sin reciproke per la vojaĝaparato de W.F.A.

W.F.A. en Danujo tuj komencos propagandon inter siaj anoj por lerni Esperanton. Oni prezentos ĉiujn lokajn eblojn kontakti kun Esperantistoj por starigi kursojn. Oni ankaŭ rekomendas korespondkursojn.

Oni intencas sendi observanton al la U.E.A.-kongreso en Malmö. Por aranĝi samtempajn diverslandajn kursojn oni certe bezonos helpojn kaj agadon de Esperanto-organizaĵoj eksterlande. Ĉi tiu kunlaboro havas vastajn perspektivojn kaj ni insiste petas al kompetentaj gvidantoj plene profiti ĉi tiun unikan okazon en sia lando.

Por Dana Esperantista Komun-Komitato,
Bangertsgade 8, Kopenhago, Danujo,
-P. Thorsen.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo : Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

OFICIALA INFORMILO

N-ro 200

6an de Novembro, 1947

INTERKONSENTO PRI KUNLABORO

Konforme al Art. 13 de la Statuto la Estraro faris Interkonsenton pri Kunlaboro kun Internacia Asocio de Poŝtmark-Kolektantoj, kies sidejo estas XPDO House, Didcot, Berks., Anglujo.

NOVAJ DELEGITOJ

Belujo

Overpelt Fabriko. FD : Pastro A. J. Beckers, Overpelt Fabriko. Tel : Neerpelt 4.
FD (Katolikismo ; Turismo) : La D.

Britujo

Halifax. FD (Socikredito) : F-ino R. M. Spencer, 42 Pear Street.

Reading. FD (Manĝaj-pulvoroj) : T. H. Cox, 69 Liverpool Road.

Ĉeĥoslovakujo

České Brezovo. D : Ján Sága, České Brezovo, okres Lucenec, Slovensko.

Gombáš. D : J. Pirončiak, Gombáš 225, p. Lubochna.

Karlovy Vary. FD (Loĝado) : M. Emmer, Zahradní 41. Tel : 2927.

Kobyli na Mor. D : Oldrich Franc. Tel : 5.

Košice. D : A. D. Kremer, Trnía ul 3.

VD : C. Bobula, Srobárova 10.

FD (Bankaj aferoj) : F. Lelovits, Komenského 15.

Malacky. D : K. Mikulič, Vajanského ul. 164. Tel : 1.

Nové Mesto n. Váh. D : F-ino M. Seppová, Štefánikova 24.
VD : F-ino M. Hlinková, Vojanského 4.

Plzen. FD (Artefaritaj floroj) : L. Svoboda, Pražská 8. Tel : 2210.

Priekopa. D : F-ino P. Višnovcová, Priekopa 488, p. Vrútky, Slovensko.

VD : J. Mičo, Priekopa 163, p. Vrútky, Slovensko.

Sučany. D : J. Masnica, Sučany 282, Turiec, Slovensko.

Svit. D : D-ro Edvin Sahlinger, Svit, Slovensko.

FD (Turismo ; komerco) : La D.

Trnava. D : J. Janoviček, Štefánikovo námestie č. 1. Tel : 2309.

Vrútky. VD : K. Chladný, Kmetova 19.

Závod. D : P. Šurina, Závod 279, okres Malacky, Slovensko.

Germanujo

Bensheim. D : H. Friess, Annastrasse 8.

Bielefeld. D : D-ro Ernst Happe, (21a) Brackwede in Westfalen, Königstr. 6.

Bremen. D : D-ro C. Renken, auf den Häfen 26/27. Tel : 27026.

Flensburg. D : F-ino E. Jacobs, Mathildenstr. 9.

FD (Ĵurnalismo) : R. Rümer, Margarethenstr. 12. Tel : 2822.

Giessen/Lahn. D : L. Bechtold, (16) Giessen/Lahn, an der Hardt 3. Tel : 3545.

FD (Arbaristaj aferoj) : La D.

Hattersheim. D : A. Maurer, Krielteler Str. 5, Hattersheim (Main). Tel : 60.

Hochheim/Main. D : J. Deneffe, Frankfurterstr. 4.

Immenstadt/Allgäu. D : H. Wankmüller, (13b) Immenstadt/Allgäu, Lindauer Str. 47.

Mosbach. D : Pastro Edmund Kuhn, Mosbach (Hessen), über Babenhausen.

Nürnberg. D : H. Raab, Auersasse 84, Nürnberg 7.

Regensburg. D : R. Schmalzl, Luitpoldstr. 12/0.

Rüsselsheim. D : K. Stolz, Richard Wagner str. 23 1/10.

Hungarujo

Budapest. FD (Kuracado) : D-ro F. Kürschner, VIII, Karácsony Sándor utca 21.

Sárbogárd. D : L. Buruncz, Andrassy-u. 97, Magyarorszáğ.

Nederlandoj

Aalst-Waalre. FD (Socikredito) : H. C. Magel, Prins Mauritsweg 89.

Apeldoorn. VD : L. Weijts, Fabianusstraat 45.

FD (Instruado) : La VD.

Coevorden. VD : M. Koopmans, Burgemeester van der Lelysingel 15.

FD (Polic—ekonomiaj aferoj) : La VD.

Delft. D : Ed. J. Veldhuizen, Hof van Delftlaan 79.

Den Haag. FD (Muziko) : H. Valckenier, van Speijkstr. 138.

Utrecht. FD (Bienregistrado ; Termezurado) : S-ino I. Koopmans-Nauta, Schimmelpennincklaan 9 (Tuindorp). Tel : 10096.

Nov-Zelando

Roxburgh. D : J. F. Holloway, Avoca House, Roxburgh, Otago.

Polujo

Sosnowiec. D : D-ro A. Ingster, Targowa 9. Tel : 61790.

Rodezio

Chingola. D : L. Spies, P.O. Box 344, Chingola, Norda Rodezio.

Sud-Afriko

Pretoria. D : S. De Waal, 337 21st Ave., Villieria.

Usono

New York. FD (Desegnado) : H. Harrison, 141-45 78 Road, Flushing. Tel : REpublic 9-7910.

ŜANĜOJ

Aŭstralio

Perth (W.A.). D : nova adreso : 190 Newcastle Street.

Brazilo

Pôrto Alegre. D kaj FD (Fervojoj) : nova adreso : Caixa Postale 3016.

Britujo

Llanddulas. D : vakas.

Ĉeĥoslovakujo

Upice. D : nova adreso : ul. Jana Želivského 2.

Francujo

Rouen. VD : vakas.

Jugoslavujo

Sombor. D kaj FD (Fotografado) : vakas.

Nederlandoj

Amsterdam. FD (Kuracado) : nova adreso : Jan Luyckenstraat 34.

Utrecht. FD (Muziko) : vakas.

Nov-Zelando

Kaitoke. D : vakas.

Polujo

Lódz. FD (Teknikaj aferoj) : nova adreso : ul. Piotrkowska 56 m. 47.

Uhnów. D : vakas.

Usono

Akron. D: vakas.

Suffern. D: vakas.

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1947

295. D-ro A. Ingster, Sosnowiec, Polujo.

296. S-ro E. Trzeciak, Rzeszów, Polujo.

297. S-ro H. Holender, Szczecin, Polujo.

PATRONOJ 1948

1. D-ro F. J. Williams, Melbourne, Aŭstralio.

2. S-ro G. van der Lijn, Uccle, Belgujo.

3. S-ro T. J. Gueritte, Surbiton, Britujo.

4. S-ro D. Kennedy, Glasgow, Skotlando.

5. S-ro J. Course, Royston, Anglujo.

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1948

1. S-ro G. W. Roome, Sheffield, Anglujo.

2. S-ro E. Ashmore Baker, Exeter, Anglujo.

3. F-ino J. Fotherby, Surbiton, Anglujo.

4. S-ro J. C. Taylor, Bolton, Anglujo.

5. F-ino L. M. Deane, Broadstone, Anglujo.

6. S-ro G. Bevan, Wrexham, Kimrujo.

7. S-ro P. van Delden Szn., Deventer, Nederlando.

DONACOJ—T. J. Gueritte 30s., J. W. Chambers 10s. 6p.,
H. Davies 20s.

DONACOJ por helpi al la elspezoj de la Petskribo—
B. McGrath 5s., C. A. Baker 5s., T. Walker 10s.

Sinceran dankon al ĉiu helpanto.

GRAVA INFORMO POR POLAJ MEMBROJ

Danke al la klopodoj de nia Peranto, S-ro R. Sakowicz, ni fine sukcesis ricevi konsiderindan sumon el Polujo. La rezulto estas, ke ni nun povas akcepti membrojn por 1948 en tiu lando. Kotizojn oni pagu al S-ro Ramon Sakowicz, Asnyka 4, WARSZAWA-OKECIE. La tarifo por 1948 estas: MJ 125, MA 300, MS 500 zlotoj.

INDEKSO

Ni pretigas Indekson de la Jarkolekto 1947. Tiu Indekso aperos kiel aparta, elprenebla folio en la Februara numero.

STATISTIKO

Jen la stato de la membraro je la 31a de Oktobro 1947, kaj ankaŭ, por komparo, je la fino de Oktobro 1946:

	1946	1947
Asociaj membroj ..	7568	8242
Individuaj membroj:		
MJ	1127	1122
MA	4245	5290
MS	255	293
Patronoj ..	24	22
DM	102	151
HM	21	53
	5774	6931
	13342	15173

CECIL C. GOLDSMITH, *Sekretario*.

ESPERANTO EN RADIO

Redaktas S-ro A. C. Oliver, 57 Woodland Road, Maple Cross, Rickmansworth, Anglujo, al kiu oni sendu senescepte ĉion pri ĉi tiu rubriko

Mallongigoj: I=Informoj, P=Parolado, K=Kurso

Ĉiutage	16.30–16.45	Praha. 1935m. kaj 31.41m. I.
	17.15–17.30	Paris. 41.21m. Komenciĝas la 15an de Decembro, Radio-diffusion Francaise, Emissions esperantistes vers l'étranger, 118 Champs-Élysées, Paris 8.
	22.00–22.15	Praha. 49.92m. P.
Lundo	11.30–11.40	PRG2 (Brazilo). 104m. P.
	21.50–22.00	Praha. 470.2m. Prelegoj, intervuoj, teatraj scenetoj, kantoj kaj informoj. Radiostacio, Stalinova 12, Praha XII.
	23.30–23.35	Budapest I. 549.5m. I. Hungara Radio, Budapest VIII, Bródy Sándor u. 7.
Mardo	17.20–17.30	Wien II. 31m. kaj 228.6m. I. Esperanto-Servo, Wien, Neutorgasse 9.
	17.45–17.50	Bern. 31.46m. kaj 48.66m. P. de D-ro Baur. Schweizer Kurzwellendienst, Postfach Transit, Bern.
	18.50–19.00	Sofia. 32.9m. P. Radio Sofia.
	21.45–22.00	Hradec Králové. 238m. (Krom la unua mardo).
	22.00–22.10	Ostrava. 259m. Radiostacio, Ostrava, Bráfova 5.
Merkredo	10.15–10.35	Paris. 431.7m. K.
	21.10–21.25	Warszawa III. 49.06m. I. Pola Radio, Warszawa, Koszekowa 8.
	23.30–23.35	Budapest I (kiel je lundo).
Ĵaŭdo	5.35–5.45	Wien I. 506.8m. I. germanlingva. Esperanto-Servo, Wien, Neutorgasse 9.
	17.45–17.50	Bern. 31.46m. kaj 48.66m. P. de D-ro Privat.
	18.45–19.00	Hradec Králové. 280m. Vychod-česky vysílac, Hradec Králové, Ĉeĥoslovakujo.
	21.50–22.00	Praha. 470.2m. (kiel je lundo).
	22.00–22.10	Ostrava. 259m.
Vendredo	18.50–19.00	Sofia. 32.9m. P. Radio Sofia.
	22.30–22.35	Budapest I (kiel je lundo).

Verda Stacio, Ĉeĥoslovakujo—30-minutaj artoprogramoj de la renovigota Verda Stacio ĉiun unuan lundon en la monato estos komencitaj de Januaro 1948, kaj estos elsendataj per unu stacio 60 kv-a kaj unu 100 kv-a. Precizaj indikoj: 22.30–23.00, 269m, 325m.

Klarigoj—En la tabelo la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich, sed demanda signo signifas ke ni ne havas precizan informon pri la horsistemo. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon. Ni petas informon pri necesaj aligoj. La donitaj adresoj estas tiuj al kiuj oni sendu gratuleterojn kaj informojn pri ricevo.

"Doksana" vokas vin!

Resono post mia anonco pri mia blankiga tolaĵbluo "Doksana", kiun vi trovis en la pasinta numero de *Esperanto*, estis mirige granda. Mi petas ĉiujn, kiuj ankoraŭ ne ricevis Doksana-paston de mi, atendi iom pacience. Multaj ja ne bone komprenis la aferon. Tial mi klarigas: La skatoletoj, kiujn mi post ricevo de 3 respondkup. forsendos al vi, entenas jam normalan kvanton de bonkvalita pasto, uzebla de ĉiu dommastrino por blankigi kaj desinfecti tolaĵojn kaj sufiĉanta por unu tuta jaro. Instrukcioj por utiligo enfermitaj en la skatoletoj. Mi esperas, ke eĉ la prezo de 3 rk. ne superas tiun ĉe via butikisto. Mi volas provizi ĉiujn mastrumojn de nia tutmonda esperantista familio kaj de tiu ĉi eksterordinara enspezo mi dediĉos ne 20% sed 30% por helpi konstrui Esperanto-hejmon en Doksy. Pro kontroleblo sendu pluajn mendojn ne al mi sed al E-klubo en Doksy apud Mácha-lago, Ĉeĥoslovakujo. Mi antaŭvidas ĝoje ankaŭ vian mendon, kara leganto. Skribu tuj.

A. Sedláč, fabrikisto,
Doksy, Ĉeĥoslovakujo.

LA LIBRO DE LA SPIRITOJ

"... bonege taŭgas por ĝustigi tiujn opiniojn kaj por forigi la miskomprenojn."—*Heroldo de Esperanto*.

"... Pri unu afero mi estas tre kontenta; la lingvo estas modela."

"... Mi senhezite diras, ke laŭ vidpunkto pure lingva ĉi tiu verko estas la plej kontentiga, kiun mi ĝis nun legis en Esperanto... la frazoj portas la stampon pri instruiteco kaj ŝato pri la plej ĝusta vorto por atingi la bezonatan nuancon... La rezulto estas libro pri kiu iu ajn literaturo povus esti fiera. Por la Esperanta ĝia valoro estas netaksebla..."—*Esperanta Internacia*.

531 paĝoj, 19 x 14 cm., broŝ. 10ŝ. 6p.,

tole bind. 12ŝ. 9p., duonlede bind. 25ŝ. 6p.,
afranko 9p.

Mendu ĉe U.E.A.

INTERNACIA POSTMARK-KATALOGO

Vol. I—Britujo

Ĉi tiu, la unua vere internacia katalogo de poŝtmarkoj, jam estas havebla, kaj filatelistoj povas havigi ĝin per la libro-servo de U.E.A. (sed nur en tiuj landoj, [de kiuj oni povas ricevi pagon] kaj de niaj agentoj. La kosto estas 4 ŝil. (afranko 3p.) aŭ 12 I.M.S. aŭ 17 respondkuponoj por la eksterlando. Al niaj agentoj ni proponas rabaton de 33 $\frac{1}{3}$ % kaj tio devus stimuli intereson pri nia Asocio kaj allogi Fakdelegitojn al kunlaboro.

Nia membraro nun estas 820. Ĉu estas eble atingi 1000 antaŭ la jarfino? Ni provu. En la anoncetoj en *Esperanto* troviĝas multaj petoj pri poŝtmark-interŝanĝo, kaj ni ne povas kompreni, kial tiuj samideanoj ne aliĝas al ni, la unusola organizaĵo kiu povas servi ilin en ĉiu rilato. Per aliĝo al ni oni helpas sin kaj la Esperanto-movadon.

Nia organo **Universala Poŝtmarka Revuo** aperos en 1948 en nova vesto, pli granda kaj eĉ pli interesa ol nun. Por certigi vin pri ricevo de ĉi tiu ekskluzive filatela revuo **abonu nun**. Krom abonoj, ni deziras ankaŭ artikolojn por ke nia organo estu vere reprezenta de la tutmonda legantaro. Sendu do mallongajn informajn kontribuojn pri la poŝtmarkoj de via lando.

La aranĝoj pri Malmō bone marŝas. Se vi ne povos ĉeesti, sendu al ni praktikajn proponojn por eĉ plifortigi nian organizaĵon.

Por ricevi detalojn pri **Internacia Asocio de Poŝtmark-Kolektantoj** kaj **U.P.R.** sendu freŝan poŝtmarkon de via lando ĝis valoro de unu respondkupono al I.A.P.K., XPDO, Dincot, Berks., Anglujo.

33a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

MALMÖ, SVEDUJO

31 Julio—7^a Aŭgusto, 1948

ALIGILO

Uzu apartan aliĝilon por ĉiu kongresano.

Skribu klare, prefere per skribmaŝino aŭ presliteroj.

Mi aliĝas al la 33-a Universala Kongreso de Esperanto, kaj samtempe mi sendas pagon laŭ la suba informo.

Familia nomo (1) S-ro, S-ino, F-ino.....

Personaj antaŭnomoj (1).....

Profesio (2)..... Nacieco (2).....

Strato kaj n-ro (1)

Urbo (1) Lando (2)

Nomo de edzo, edzino aŭ familiaĵo, kiu samtempe (pere de apartaj aliĝiloj) aliĝas al la kongreso

Naskiĝjaro (por junul(in)o)..... Vegeterano?.....

(1) En nacia lingvo. (2) En Esperanto.

KONGRES-KOTIZOJ

		Ĝis		Poste
		31-12-47	31-3-48	
Kongresano	sv. kr.	20	25	30
	aŭ ŝil.	28	35	42
Edzo aŭ edzino de kongresano ..	sv. kr.	10	15	20
	aŭ ŝil.	14	21	28
Junul(in)o, ne pli ol 20-jara ..	sv. kr.	8	10	15
	aŭ ŝil.	11	14	21

Aliĝilojn kaj pagojn oni sendu al la Kongreso laŭ la supra adreso, aŭ al Universala Esperanto-Asocio, Herongate, Rickmansworth, Herts., Anglujo.

Aliĝilo sen pago estas senutila.